


Maailma  
Pisimo



*M. Laarman: Kverko êe la lago Valgejärv.*

4

1961

## Dag Hammarskjöld ekripozis (18/9, 1961)

La korskua tragedio en Afriko, kie DAG HAMMARSKÖLD kun siaj kunuloj dum pacpera agado pereis kaj trovis anstataŭ la paco de la mondo nur sian pacon, obtuzigis la homan voĉon en Svedlando kaj supozeble en la tuta mondo. Svedlando perdis unu el siaj plej multflankaj kaj honestaj kulturindividoj, kiu dum 8 jaroj plenumis "plej neceblan laboron de la mondo" en UNO. Laŭdo ne dorlotis, kritiko ne timigis lin. Pri liaj rezultoj la historio juĝos, laŭ nia konvinko tre pozitive. — Kiel verkisto, tradukisto li apartenis al la 18 svedaj akademianoj. — Jam ekmoviĝis la sveda socio por instali altruisman fondaĵon por lia omaĝo.

En nia vundŝirita mondo multaj kapoj multe kliniĝas antaŭ la memoro de Dag Hammarskjöld.

## E N H A V O

Grava raporto .....	97
Ni malgravuloj .....	98
Kalocsay 70-jara .....	99
Kalocsay: Duope .....	100
A. Komját (Kalocsay): Rekrutigo ....	100
Olli: La poeto .....	101
B. Darázs: Mesaĝo .....	101
L. Tolstoj (M. G.): La birdeto .....	102
S. Stephansson (B. R.): Mara magio ..	102
Soya (W. Nielsen): La ensorĉita ĝardeno .....	103
Jevsejeva-Lippe: Al K. Kalocsay ....	105
Hj. Gullberg (Lulkanto) .....	106
E. Munch kaj la grafiko .....	107
S. Császár: Ankoraŭ lastfoje .....	109
F. Karinthy (Kussinszky): Dia providenco .....	110
F. G. Lorca (K. Guŝev): Lamento ....	111
Ernest Hemingway .....	111
J. Labáth: Ekster la sezono .....	112
Kalevipoeg 100-jara .....	113
P. Walter (K. S.): Leonardo .....	114
A. Benneth (M. Boulton): Bani la bon (II.) .....	116
L. Jevsejeva: Fianĉiĝo .....	120
J. Sapir: Internacia lingvo .....	120
K. Piĉ: La eterna S. Holmes .....	121
K. Galczynski (W. Wiecko): Maljunulo	123
Recenzoj: Malsata ŝtono, Triumfo la politiko, Otelio, Tragedio en la Universo, Hungara Vivo, Jugoslavia Fervojisto, La Suda Stelo, Vietnamia literaturo .....	124
Arĝenta Sprono, novaĵoj 126, 3-a kovrilp.	

## NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura  
revuo, dumonata*

Cefredaktoro:

*Ferenc Szilágyi*, Döbelngatan 66,  
BORÁS. (Tel. 244 22.)

Redakcio:

*Baldur Ragnarsson*, (Reykjavik),  
*Johan Hammond Rosbach*  
(Sarpsborg),  
*Vilho Setälä* (Matinkylä),  
*Poul Thorsen* (Kopenhago).

Ansvarig utgivare:

*Yngve Nilsson*.

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stockholm

Abonprezo:

10:— sv. kr. (25 intr. rkp., 2:— us dol. 29 steloj.) Unuopa numero 2:50 sv. kr. (6 int. rkp.) Abonu ĉe la administrejo per poŝtĉeka konto 15 54 80 aŭ ĉe la landaj esperantoidonejoj-libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 80:— sv. kr., 1/2 p. 50:—, 1/4 p. 25:—, 1/8 p. 15:—, 1/6 p. 12:—, Korespondaj anoncoj 4:— sv. kr. (10 int. rkp.)

La redakcejo ne resendas ne akceptitajn manuskriptojn.

## NIA TITOLBILDO

estas ksilografio de estona majstro, Märt Laarman, grafikisto (n. 1896).

# GRAVA RAPORTO

Tre malofte ni uzas niajn paĝojn por paroli pri ni mem. Por tio ni ĉiam preferis sendi apartan leteron al niaj amikoj kaj simpatiantoj.

Sed nun ni rompas la kutimon pro grava kaŭzo. Nia organo baldaŭ atingos sian okan jaron. Sep nefacilaj jaroj alportis al ni tiom da karaj instigoj viaflanke, afabla Leganto, ke ni nun scias, ke N. Pr. iĝis viva parto de nia kulturo, ĝi iĝis modesta, sed ne maldigna peno en la servo de la universala kulturo. Por tia laboro kelkloke oni havas ŝtatan subtenon. Nia sendependa organo ne ĝuas ion tian. Ni ne plendas pro tio. Ĝustus tamen nedanke ne menciis la bonvolan sisteman pruntadon de kliŝoj fare de la stokholma Sveda Instituto.

Niaj iamaj malfacilaĵoj ankoraŭ ne malaperis kaj ili kaŭzis kelkfoje skuon en nia laboro. Tiuj ĉi ĉefe ekonomiaj malfacilaĵoj siatempe ĉenreakciis en multaj rilatoj, i. a. ili influis kelkfoje dum la jaroj la akuratecon de nia apero. Sed tiu simptomo nun ne plu ekzistas. Unu fakto estas nepre menciinda. Ni fiksas la abonprezon laste en la fino de 1956 kaj kontraŭstaris la altigon de tiu, kvankam la tuta vivo, la preskosto, la laborsalajroj malproportiigis la penon de nia tute ne profitavida entrepreno. La konservo de tiu prezo por abonoj, anoncoj nun jam signifus gravan malgajnon al ni. Kiam ni nun sentas la devigon de la cirkonstancoj tre modere, nur per 2 sv. kr. altiĝis la abonprezon, de 1/1, 1962, ni tamen volas doni eblon al nia fidela legantaro, konservi la malnovan prezon por 1962.

Alivorte: post 1/1, 1962 la jarabono de Norda Prismo estos 12 sv. kr. aŭ 2 1/2 us. dolaroj, sed por ĉiu, kiu enpagas abonon (ankaŭ donacabonon) antaŭ la 15 -a de jan. 1962. (konstateble laŭ la poŝta stampo) rajtas pagi la malnovan 10: — kronan (2-dolaran ktp.) abonprezon laŭ la informoj en la ĉijaraj n-roj.

Pri niaj celoj nun sufiĉas diri, ke ni daŭre donos ĉiujn niajn fortojn prezenti agrablan, ĉiurilate utilan kaj varian revuon kun eduka enhavo. Nin spronis kaj spronos via instigo kaj via opinio. Aliflanke: se vi ĉiuj aktive varbus almenaŭ po unu nova abonanto, nia revuo povus atingi ankoraŭ multajn adresojn.

Sincere ni parolu pri nia nuna stato: ĉimomente ĉ. 1200 abonantoj. Por atingi ioman stabilecon ni bezonas 1500, por normala ekzisto 2000 abonantojn, kiu nombro eĉ en la valutdekretita, dise ampleksa Esp.-merkato tute ne aspektas utopia. De kiam nia apero estas laŭprograme akurata, nia abonantaro kaj ĉefe la pago por la abonoj konstante kreskas. Efektive centoj da abonoj enfluis dum la lastaj monatoj. Tio kaj nia promeso daŭrigi samenergie nian laboron konvinkis por daŭrigo la gvidantojn de la presejo, al kiuj ĉiloke ni dankas la montritan bonvolon kaj helpemon al nia entrepreno idealisma. Tia kompreno estas menciinda ĉe komerca entrepreno.

Ni petas do denove, pripensu kaj ekagu!

Danke kaj plenfide

*La redaktejo kaj administrejo.*

# TRA NIA PRISMO


## NI MALGRAVULOJ

La scienco atakas la kosmon. Post la unua grandioza flugo de la sovetia majoro, Gagarin, sekvis nova kaj kolose grava daŭrigo, el kiu monumetiĝas la tuttaga kosma flugo de alia juna sovetiano, majoro Titov. La gravaj usonaj rezultoj ĝis nun estas malpli rekordaj. Malantaŭ la kulisoj okazas en la diversaj partoj de la mondo febraj, konstantaj eksperimentoj por solvi la enigmojn de la kosmo *kun la ĉesto de la homo* kaj finfine tute transformi la teran vivon. Oni povas nur respekti la sciencan, kiu genie, senlace kaj konsekvence preparis tiun ĉi evoluon kaj kies verko nun fariĝas. La scienco devas esti internacia kaj se ni nun rajte parolas pri ege imponaj kosmosciencaj rezultoj de la sovetia scienco, ni deziras do ĉies sukceson, la triumfon de la Homo, t. e. la kompletan kaj supernacian favoran konkludon de ĉiuj rezultoj por la bono de la tuta terloĝantaro.

Per aliaj vortoj: ni malgravuloj sur la tero ĉie — laŭ nia supozo — havas nur unu deziron, ke la rezultoj utilu eĉ en la transira tempo de la historio al nia senpretenda vivo, ke ili donu al nia vivo harmonion, dignan moralon kaj baze por ĉio ĉi *pacon*. Dum

la grandiozaj rezultoj de la kosma esplorado radias lumon el si, ni jubilas. Sed kiam ili ĵetas malhelan ombron de pereiga milito, ili ŝanĝiĝas je malicaj, ĉiam ĉeestantaj demonoj en la vivo, forrabantaj la senton de la sekureco, promesantaj malaperon post la konstante malcerta vivo per la plej maldigna morto en la eksploda kavego de la infera nuklea bombo.

Ni malgravuloj povas nur aŭdi minacojn kaj kontraŭminacojn de la gravuloj. Ni sincere angoras pro la militistaj reciprokaj paradoj sur la tero, en la akvo, en la aero kaj ni timas, ke ankaŭ en la kosmo. Ni malgravuloj sentas, ke ni povus atingi niajn similulojn en la plej diversaj partoj de la mondo pli nature, pli efike kaj ĉefe malpli danĝere ol per la bruo de la gigantaj armiloj, kies tondro ne estas lingva argumento. Ni malgravuloj volas absolute neniajn armilojn; despie ni ne volas sperti la efektivcon de la atom- aŭ nukleaj bomboj. Ni scias, ke ofte ni malgravuloj vidas ĉion, eĉ la konsekvencojn pli klare ol la gravuloj, kies vortoj estas pezaj kiel bomboj kaj eĉ atombomboj. Ni malgravuloj volas graviĝi antaŭ ol estos malfrue. Ni komprenas unu la alian ĉie kaj pensas egale ĉie.



# KALOCSAY 70-JARA



Kolomano Kalocsay festos sian 70-jaran naskiĝtagon la 6-an de oktobro. Pri lia lumtursimila rolo en nia kulturo oni povus kaj volus skribi longegajn artikolojn, sed mankas al ni spaco. Se ni volus laŭ inda digno prezenti la multifacetan verkadon kaj gravon de nia gigantulo, ni devus ekspluati tutjaran amplekson de Norda Prismo. Ni povas do elekti la manieron, kiu estas vere malo de la monografia precizo, sed kies vakuajn partojn la leganto povas mem pleniĝi. Baldaŭ li estos 50-jara esperantisto (1963), t. e. li esp-istiĝis kiel medicina studento. Ankorau nun li estas aktiva kuracisto kun profesora titolo kaj kiel medicina fakulo li estas unu el la plej elstaraj. Liaj baldaŭ 50 jaroj en la Esp.-kulturo signifas por ni tian amason da eternaj valoroj, ke oni demandas sin, kiel li povis havi tempon dum laciga ĉefkuracista praktiko, paralele kun fakliteratura laboro, traduki perfekte "Tragedion de l' Homo", de Madách, la "Inferon" de A. Dante, "Johanon la Bravan" de Petöfi, Arthistorion de Hekler, kaj eldoni tradukojn el 22 lingvoj ("Eterna Bukedo"), kiu efektive enhavas nur fragmenton de liaj tradukoj. Ankaŭ la "Taglibro" kaj "Rom-

aj elegioj" aperis en libroformato kaj aperos ankoraŭ pluraj volumoj. (Petöfi k. c.)

Kalocsay komencis sian karieron kiel originala poeto hungara (sed tre baldaŭ lin konkeris Esperanto) kaj li iĝis gigante granda kaj influhava ankaŭ en la originala poezio ("Mondo kaj Koro", "Streĉita Kordo", "Rimportretoj") "Oni aŭdas resoni en liaj originalaj versoj la tonon de profunde humana voĉo... li atingas suprojn ĝis nun ne alflugitajn..." diras pri li Waringhien.

Du tute diversaj geniuloj Kalocsay kaj Baghy samtempe donis lumon al la vivo de Esperanto, kies literaturo ricevis pro ili ĉiujn kondiĉojn de plenvalora lingvo.

Kalocsay estas ankaŭ prozisto, esisto ĉefe, pri kio atestas i. a. ankaŭ liaj kontribuajoj al Norda Prismo. Cetere li eldonis eseojn kun la titolo "Lingvo, Stilo, Formo" kaj kun Waringhien "La Parnasan Gvidlibron". Kiel lingvisto li prezentis sin (kune kun Waringhien) per la grava scienca verko "Plena Gramatiko" kaj kune kun aliaj (sub lia gvidado) li kunmetis la "Hungaran Antologion" kaj grave kontribuis al la "Enciklopedio de Esperanto".

Kiel redaktoron lin laŭdas la belegaj volumoj de "Literatura Mondo", dum kies tri periodoj lia ĉefredaktora nomo estis konstanta ornamo de la grandioza revuo.

Post tiu ĉi preskaŭ seka kaj mankhava registro de la agoj ni aldonu kelkvortan karakterizon de Waringhien pri la ekstera apero de Kalocsay: "Alta facilgesta viro kun moviĝemaj manoj kaj tre karakteriza kapo; longa ĝuama nazo, profundaj, brunaj okuloj, alta nuda frunto, kaj

K. Kalocsay:

## DUOPE

(El "Streĉita kordo", 1931.)

La brakojn mi etendis vaste,  
vaste for,

Por ĉirkaŭpreni Teron kvazaŭ  
Ekvator'

Kaj post la arda kaj aŭdaca  
brakosving'

Fermiĝis mia ame prema brakoring'

Kaj vin ĝi kaptis, vin ĝi ringis,  
sole vin,

Kaj vin ĝi gardas, lulas, vartas,  
Amatin'.

Mi vin atingis, ĉirkaŭringis, kien plu?

El senelira rondo de l' individu'

Mi ĵetis min al la Amaso kaj Tumult',

Por serĉi fandan savon en la svarma  
Mult'.

Mi ĵetis min en varmsoifa trema nud',

Sed min repuŝis frosta ŝelo de testud',

Kaj erinacaj dornoj kaj rigida mask'.

La vangoj brulis pro la honto de  
fiask',

La koro sangis. Dronis la ekstaza cel',

Kaj nur vi restis, mondvalora

Bagatel';

El la amara Multo restis dolĉa Du'.

Unika, sankta, animforĝa, sorĉa

Du' . . .

Eterne jam mi trinkas kaj soifas vin.

Ĉu mi do amas vin? Ho ne — mi  
vivas vin,

Mi vivas nin. Ni dancas en eterna  
lul':

Atoma par' de nerompebla molekul'.

En mondfluido plena de amara sal',

Jen ni: komenca molekulo de kristal',

Kaj ĉia, ĉio, jen, kun diamanta bril'

Metiĝas ĉirkaŭ nin! Kaj kun facetoj  
mil,

Kolorojn ravajn radiante en dispers',  
kreiĝas ĉirkaŭ ni kristala Univers'!

Aladar Komjât (1891—1937)

## REKRUTIGO

Pioniro de potence progresita kontraŭmi-  
lita aktiva poezio en la hungara litera-  
turo, samtempe profunde individuo li-  
rika. La traduko aperis en la nro 1/1961  
de "Hungara Vivo". La aperdato de la  
originalo estas 1916.

Jen Johan' Trezora!

Bona por fatraso.

Mikael' Konstanta!

Bona por forpaso.

Petro Diotima!

Bona por blasfemo.

Jen Andreo Gaja!

Bona por plorĝemo.

Jen Francisko Forta!

Bona kriple putri.

Jen Jozefo Dika!

Bona vermojn nutri.

Jen Kaspar' Bonhoma!

Bona por rabbesti.

Jen Adam' Verdira!

Bona por ne esti.

El la hungara: K. Kalocsay

Gloso: Fatraso = aĉaĵaro.

ĉio substrekita de la ironia, iom diabla ridstreĉo de la lipoj." (Enciklopedio.)

La aldonita karikaturo estas parto de grupkarikaturo de I. Barta.

Kiel ni jam anoncis, la hungara ŝtato distingis la grandan duopon Bag-

hy, Kalocsay per speciala ordeno. Norda Prismo ne povas doni ordenojn, nur esprimojn de ne priskribeb-la dankemo, admiro kaj radiojn de interna varmo, kies emanado atingos nian nunan grandan jubileanton.

F. S.

## LA POETO

— Ĉu mi ĝenas, sinjoro poeto? Probable vi ĝuste nun kreas poezion.

— Tute ne, vi tute ne ĝenas. La inspiriĝo okazis jam antaŭ nelonge. Tre konvena ideo! Kio estas pli blanka ol la blanka mem? Kio estas pli blanka ol sunbrila neĝo? Kio estas pli blanka ol blanka cigno en luno?

— Ĉu tio eble estas la frumatena akordo de ĉasta animo?

— Tute ne! Tio estas blanka tolaĵo de Hilda!

— Temas do pri amuza idilio...

— Temas pri lavopulvoro. Mi reklamas la lavopulvoron "Hilda". "Hilda" blankigas ĉion. Ili pagas bone.

— Mi ne povas ne demandi, sinjoro poeto, ĉu veras la onidiroj, ke favore recenzita via unua poezia verko "La florplantetoj en forta tero" vendiĝis en entute 371 ekzempleroj. Ĝi ja estis lirika poezia verko. Estis vere eksterordinare bona rezulto!

— Eta eraro! Ĝi ne estis la unua. La unua havas titolon "Nebuleto en nebuleto". Vendiĝis 17 ekzempleroj. Mia monujo ne permesis aĉeti pli multajn.

— Sed via sekvinta verko ja estis "La florplantetoj en forta tero"?

— Jes. Sed la titolo ne estas "en forta tero", sed "frosta tero". "La florplantetoj en frosta tero"!

— Ĉu jes, pardonu. Kaj ĝi do akiris vendon de 371 ekzempleroj.

— Jes. Pro la bona vendorezulto mi ŝuldas dankojn al ĝia bona titolo.

— La titolo de libro do gravas.

— Tre gravas. Ĉar pri la verko havanta titolon "La florplantetoj en frosta tero", multaj homoj opiniis, ke ĝi estas ĝardenlibro. Kaj tial pli ol tricent florgardenistoj aĉetis ĝin. Be-

## MESAĜO

Ĉiu stelo estas sunsistem' aparta,  
Sed por ni nur frida, malproksima  
stel'.

Gapas ni nur sub la brilo miliarda...  
Restas senkomprenaj: vortoj de l'  
vesper'.

Ke post ĉiu stelo homoj vivas certe  
Jam eĉ tio ne neblas mense nun.  
Rigardante ili kantas samaserte  
Pri la stela brilo, de sur nia sun'.

Nia suno nin per varmo, vivo vartas,  
Sed por ili signon sendas per la bril',  
Ĉiu brilo — mesaĝeto, ke ni startas,  
Jen artlunoj montras: vojon de  
l' sopir'.

daŭrinde la plej multaj el ili tamen  
resendis la libron rimarkinte sian  
miskomprenon.


— Ĉu tiel ili opiniis.

— Jes, jes. Mian sekvintan verkon  
mi titolis "Kion signifas miaj sonĝoj".  
Oni vendis ĝis nun 7.450 ekzemplerojn.

— Kio! Tio ja estis brila penso!  
Vere bonega ideo! Nun la homoj pro  
la titolo batalis aĉeti vian verkon!  
Opiniante ke ĝi klarigas sonĝojn.

— Jes, ĝi estas libro de sonĝklarigoj.

El la al finna: *Vilho Salonen*  
(Tampere)



## LA BIRDETO

(Proza poemo)

Bela estas la vivo kaj bela estas la mondo, sed la homoj estas malbonaj kaj ili ne kapablas taksi sian feliĉon. Tiel mi meditis, kiam karesate de la bela naturo mi aŭdis el fora arbusto la gajan, senzorgan kanton de birdeto.

Tiu ĉi birdeto ne scias, sur kies tero ĝi kantas, ĉu sur rusa humo aŭ sur la tero de fieraj montaranoj. Ĉi stulta birdeto evidente kredas, ke la tero apartenas al ĉiu tie loĝanta vivanto. De amo saturita, kantanta ĝi flugis ĉi tien kaj faris neston ĉi tie; ĝi ja povas flugi ĉien, kien ĝi volas, kie ĝi trovas arbojn, aeron kaj ĉielon. Ĝi havas nenian konjekton pri rajto, senrajto kaj konas nur unu potencon, la potencon de la naturo, al kiu ĝi senpense kapitulacas. Stulta estas ĉi birdeto, tial ĝi fajfas sian kanton tiel senzorge; nenio dezirindas, nenia timindas por ĝi . . .

Sed kelkfoje ankaŭ vi timeme kaŝas vin inter la abundajn herberojn, eta birdo, angore vi levas al la ĉielo viajn etajn ruĝajn okulojn kaj tremante, time atentis la malrapidan glitan flugadon de la nigra rabobirdo. Ĝi ja aperis ĝuste tial super vi, ke ĝi trovi vin, ke ĝi falflugu kontraŭ vi! Ĉu vi vidas, kien fiksis sin ĝiaj avidaj okuloj? Precize al tiu loko, kie vi embuskas kaj per viaj vaste malfermitaj etaj flugiloj volas ŝirmi viajn nudajn idojn. Nun tremas vi, nun timas ankaŭ vi . . .

Eta birdo, ĉu estas iu ic, kiu ne devus timi maljuston kaj persekuton?

Esperantigis: M. G.

## MARA MAGIO

Stephan G. Stephansson, (1853—1927), estas unu el la plej grandaj islandaj poetoj en la moderna tempo. 20-jara li translokiĝis al Ameriko, kie li fariĝis bienulo. Malgraŭ sia forloĝeco disde la hejmlando, li ĉiam verkadis en la islanda lingvo. Lian poezion distingas profundo kaj forto.

*Sur ondar' blankiĝas garb',  
flagras haroj torde,  
brilojn faras luma garb',  
plaŭdas maro borde.*

*Spronas min el borda seĝ'  
ŝvela sin' min lanĉi,  
kun filinoj de marreĝ'  
ŝipofine danci.*

*Sub ĉielo de minac'  
ni ekvelu brave,  
dancu bele laŭ surfac'  
ondoŝvelo kave.*

*Ventpelataj ondoj sin  
ĵetas batoprete  
al boat' kaj lekas min  
sur manplat' kokete.*

*Stangoŝove kreskas vent',  
maron blov' stimulas,  
ondojn bove en torent'  
frida povo rulas.*

*Al haven' mi lasas min,  
ondoplen' min puŝas.  
Mara ben', en via sin'  
kun seren' mi kuŝas.*

*Maston stringas venta lang',  
sonas klinge velo,  
voĉojn ŝvingas el la stang'  
ŝtormofingra pelo.*

*Jen falango de malsek'  
kontraŭ sang' aŭrora!  
Benu vangon via lek!  
ondo lang-fervora!*

Baldur Ragnarsson tradukis

*Glosoj:* lanĉi — forlasi al ĝia elemento ekz-e ŝipon, frida — malvarma, stringi — ĉirkaŭpremi.



## La ensorcĉita ĝardeno

(Carl Erik) Soya estas dana verkisto. (N. 1896). Li apartenas jam de komence al la opoziciantoj. Dum la milito la germanoj internigis lin. Realisto kaj simbolisto samtempe, eĉ psikoanalitikulo. Tre originala dramverkisto kun inklino al la grotesko kaj fortaj, ŝokaj efektoj.

Dank' al la netravigebla saĝo de iu privatfervoja direktoro mi devis iun tagon en la plej frua printempo pasigi unu horon kaj tri kvaronojn en urbeto, al mi tute seninteresa. Unu horo kaj tri kvaronoj estas ja nenio en grandurbo, kie promeno tra la stratoj estas pli interesa ol dimanĉa gazeto. Sed unu horo kaj tri kvaronoj inter 57 domoj kaj 324 loĝantoj kaŭzas al mi certe animdepresion. Denove mi konvinkiĝis pri la elastikeco de la tempo. Rigardante la horloĝon kun la supozo, ke jam pasis duonhoro, mi konstatis, ke nur 5 minutoj pasis, kaj supozante pason de 5 minutoj mi konstatis, ke la montrilo tute ne ekmoviĝis.

Krome la vetero estis griza kaj pluvetis!

La unuan kvaronhoron mi pasigis en la malgranda atendejo de la stacidomo. Sed studinte sennombrajn trajnhorojn, (kiuj eĉ ne plej ete interesis min), tabelon pri protekto de birdoj (pri kies ekzisto mi ĝis nun nenion sciis), kaj afiŝon de asekura kompanio (montrante viron, kiu plantas arbon kun radiko en ambaŭ ekstremoj) — jes, tiam mi trovis nenion pli bonan ol promeni en la urbo malgraŭ la vetero.

Post ankoraŭ unu kvaronhoro mi ne nur konis ĉiujn domojn de la urbo, sed ankaŭ ĉiujn ĝiajn variojn de florpotkaŝiloj. Feliĉe al la urbo, ke

mi ne havis ĉielan potencon kaj ordoneblon — tiuokaze mi verŝajne en mia enuo estus detruanta ĝin per fajro kaj tertremoj! Ne, ĉar ĝi estis iu Sodomo aŭ Gomoro. Male ĝi montris nemiskompreneblan stampon de virto kaj prudento, de deca klereco kaj prudenta prospero, de spirita kaj korpa puremo. — Ah! Ja ĝuste estis tio, kio igis ĝin tiom neeltenebla.

En mia malespero mi ne sciis pli bonan solvon ol promeni ekster la urbon.

Estis — kiel jam dirite — printempo, sed nur laŭ la kalendaro. Sur arboj kaj arbetoj: ne unu verda folio. Tie kaj tie-ĉi kelkaj krokusoj kaj aliaj floretoj — kaj la Sinjoro estu glorata pro tiuj. Krome nur koto sur kampoj kaj vojoj, en ĝardenoj kaj fosaĵoj — koto ĉie.

Jes, irante tie mi ne tute povis liberigi min de malbelaj pensoj pri mia patrujo. Kaj pri ĝia aspekto, ĝia arkitekturo kaj ĝiaj loĝantoj.

Rigardu nur la domojn kaj la ĝardenojn laŭlonge de la vojo. Ĉiuj laŭ la principo: pro Dio, ne aliel ol ĉe la najbaroj. Mi vidis kvar domojn, unu post la alia, konstruitajn tute egale. La sola diferenco estis, ke du el ili havis malpurflavajn pordojn kaj fenestrokadrojn, sed la aliaj malpurbrunajn. Estas eble, ke la domoj funkciisme estis bonegaj — sed tiuokaze mi pli ŝatas la funkciismon intelekte ol sente.

Sed dum mi iris tie kolektante mallicon, mi subite venis al ĝardeno tute diferenca de la ceteraj. Ĝi ne havis arbojn aŭ arbetojn, ĝi havis nur razeton, paŝejojn kaj kelkajn printempflorojn. Kaj ŝtonojn! Ŝtonojn kvazaŭ en tombejo, sed ŝtonojn de tre eksterordinara aspekto!

La pasejo de la strato ĝis la enirpordo estis heĝita per cementtuboj. Sur la razeno estis cervo, hundo, ci-

konio kaj rano, ĉiuj el cemento kaj amorstatueto el biskvito kaj ŝtonanĝelo sen kapo. En unu angulo blankaj silikŝtonetoj kaj ruĝaj brikoj festis en danan flagon. La cetera parto de la ĝardeno estis dense kovrita per muellilaj ŝtonoj, strangformaj silikpecoj, konkoj, tegoloj kaj restaĵoj de porcelanfiguroj...

Unua impresio: Ĝardeno de eksterordinara malbeleco. Sendube aĉa! Estis en tiu ŝtondezerto la sama atmosfero, kiel en ĉambro sen fenestraj kurtenoj aŭ tapiŝoj. Sed ĝi estis terura ankaŭ en alia signifo. Ĝi ja malkovris, ke la homoj, kiuj posedas ĝin, devas estis stranguloj aŭ duonfrezuloj...

Niaj sentoj ŝanĝiĝas rapide. Kial priatenti la ĝardenon serioze. Fakte la ĝardeno estis ja preskaŭ komika. Ridinda ideo. Esprimo de malbona gusto, pleba menso — kontraŭ kio oni plej bone defendas sin per kulturita ridaĉo.

Kaj tiam mi reekiris —

Sed la ĝardeno fariĝis ekscitilo, de kiu mi ne povis liberigi min. Ĉi-tie ja fine estis tio, kion mi serĉis: homo, kiu ne similis al la najbaroj — kaj kiu havis kuraĝon esti si mem! Se oni ne povus diri alion bonan pri lia ideo, oni almenaŭ devus konfesi, ke ĝi estas originala.

Kaj subite mi turnis min — kaj reiris al la ĝardenon... kie mi ekstaris ĉe la palisaro rigardegante. Mi bone sciis, ke tio estas kontraŭ ĉia deco, ĉia bonmoro, sed —

Subite venis viro el la pordo — malgrasa maljunulo... kun verdflava barbo, nigra etbienulĉapo kaj porcelanpipo...

Mi estis surprizita kaj ankaŭ iomete en embaraso... Kaj por savi la situacion mi diris al li:

"Kian amuzan ĝardenon vi havas!"

"Nu, jes"

Li ŝajnis iomete surprizita, sed ĉar li kredeble ne alkitimiĝis al tia hontinda falseco, li ekfidis je mi kaj alproksimiĝis. Li venis al la palisaro malgraŭ la pluvo.

"La najbaroj ne ŝatas ĝin."

"Ĉu ne?" mi diris kaj ŝajnis konsterniĝon. "Mi almenaŭ ŝatas ion, kio estas eksterordinara." Mi ĝojis, ke mia lasta frazo ne estis tute malvera.

Malgraŭ la konstanteco de lia maljunulvizaĝo estis videble, ke miaj vortoj ĝojigis lin. Liaj malgrandaj ruĝgrandaj okuloj preskaŭ viviĝis, kaj mi eĉ pensas, ke ili ŝveliĝis.

"Ĝi ja kostis al mi multan penon", li diris. Li montris per la pipo al granitglobo — supozeble el iu bieno. "Tiun-ĉi mi ruligis pli ol unu mejlon. Kaj ŝin —" Estis la ŝtonanĝelo — "mi mem veturigis sep mejlojn per trenĉaro". Li aldonis — videble fiero pro siaj fortoj: "Ŝi estis tre peza".

Kaj nun li ekmenciis la trovejon kaj trovjaron de ĉiu ŝtono. Kolektmanio! mi konstatis. Sed kial ne kolekti ŝtonojn? Strangformajn ŝtonojn! Tio ja ne estas pli sensenca ol kolekti poŝtmarkojn, alumetuojn, butonojn, monerojn, pentraĵojn — Jes ankaŭ pentraĵojn. Ĉar kvankam — kompreneble — pentraĵoj havas estetikan valoron, mi neniam vidis ŝtonon, — estu strandŝtono aŭ simpla ŝtonpeceto — kiu ne estis peco da beleco. Subite mi memoris, ke mi mem en mia hejmo havas amason da ŝtonoj en tirkestoj kaj ŝrankoj, jes eĉ sur bretaroj kaj tabloj. Kelkaj el ili pardonpetas ludante leterpremilojn. Sed la plej multaj el ili estas same neutilaj — kaj idiotecaj? — kiel la ŝtonoj, kiujn mi ĉi tie rigardis...

Ne, mi ne havis kaŭzon priridi ĉi-tiun maljunulon aŭ senti min pli

saĝa. Male, li estis sekvinta sian interreson pasie kaj abunde — inter alie li sciis, de kie venis ĉiu ŝtono, kaj kiam li ricevis ĝin! — Mia ŝtonkolekto male estis nur hazardaĵo.

Cetere mi konstatis, ke lia kolekto komenciĝis antaŭ proksimume dek jaroj. — Tion diris al mi la jarnombroj.

Mallonga paŭzo. Dum kiu mi serĉis en mia cerbo kelkajn finvortojn — nun estis tempo plui.

Sed antaŭ ol mi sukcesis, li diris trankvile: "Vi ja povas vidi, ke estas ensorĉita ĝardeno, ĉu ne?"

Mi kaŝis la ŝokon.

"Je-es — eble — tio dependas de kio vi efektive opinias per "ensorĉita"?"

"Dumnokte ĉio estas vivanta", li klarigis, "la statuoj promenas kaj... la animaloj kuras kaj... la ŝtonoj saltas. Mi ofte rigardas ilin sidante ĉe mia fenestro."

"Ĉu vere!" mi diris kun la plej neŭtrala akcento, kiun mi momente povis atingi.

Ĉu estis ŝerco aŭ seriozo? Mi plej emis supozoj la laston. Estis nenio en lia konduto, kiu ŝajnis ion nenormalan.

Mi sentis, ke mi devis diri ion. Felice mi ekhavis bonan ideon —

"Kiel vi ekhavis tiun ideon", mi demandis, "dekoracii vian ĝardenon per ŝtonoj?"

Li alproksimiĝis ankoraŭ unu paŝon kaj ĉirkaŭrigardis. — Neniu estis videbla. Tamen li malaltigis la voĉon:

"Jes, vi komprenas — ne estas ja por mia propra amuzo. Mi maljunulo ja ne povas ludi kun ŝtonoj, kaj mi loĝas tute sola ĉi-tie — Mia edzino... jes, mia edzino ne estas tute sana kaj dum dek jaroj ŝi kuŝis en... en frenezulejo. Ŝi frenezigiĝis, vi komprenas, kiam mia filo mortis. Li estis la

## AL KOLOMANO KALOCSAY

(6/10, 1961)

*"Parnasa Gvidlibro" por ni —  
Kvazaŭ biblio surtabla.*

*Forton el ĝia profundo  
Ĉerpas ĝissate poet'.*

*Dante per laŭroj vin kronis.  
Restos por verda popolo*

*Via impona verkaro —  
Kiel eterna buked'.*

*Ludmila Jevsejeva kaj  
Elvira Lippe.*

sola, kiun ni havis... Li estis 5-jara tiam, li estas entombigita tie." Li montris per fingro al blanka preĝeja turo iom ekster la urbeto — "Sed, komprenu, sinjoro, nokte li venas ĉi-tien por ludi. Dum lia vivo ĉi-tie, li tre ĝojis ludi per ŝtonoj... li povis sidi dum horoj kun kelkaj ŝtonetoj, kiujn mi kunportis hejmen al li... kaj por ke li venu ĉi-tien anŝtataŭ kuri al iu alia loko, mi faris ĉion-ĉi."

Dum la maljunulo rakontis pri la knabo, kiu rajdis sur la cervo, pafis per la kanonoj kaj ludis kun la hundo, mi ekkomprenis, ke mi estis blinda. Terure blinda. La urbeto ne estis enuiga. Kaj la ĝardeno estis — vidita per okuloj de kompreno — vere ensorĉita.

La pluvo ĉesis. La posttagmeza suno brilis tra okulo en la nigreblua ĉielo. Kiel la ŝtonoj staris tie — en ruĝaj melankoliaj radioj — mi komprenis, ke mi almenaŭ por kelkaj sekundoj venis al la fabellando, al tiu fabellando, en kiu homoj, kiuj multon suferis, povas ŝanĝi siajn zorgojn kun kompata iluzio.

Trad. el la dana: *Willy Nielsen,*  
Kompedal, Danlando.

# HJALMAR GULLBERG (1898–1961)



Hjalmar Gullberg — membro de la Sveda Akademio — unu el la grandaj poetoj de la norda literaturo, post kruela malsano tragedie renkontis tiun morton, al kiu dum longaj jaroj li fiksas sian rigardon. Forme lia liriko estis noveca, muzika kaj vortŝpara poezio kun frapantaj cfikoj pro la amplektado de la ĉiutaga lingvo en la plej majestajn sublimaĵojn. Gullberg enpaŝis en la literaturon kiel parnasa figuro, kiun oni volonte estus enregistrinta inter la klasikulojn, kiujn ne multe koncernas la medio, en kiu oni vivas. Oni konsideris lian lirikon nur ia kapta kaj vera transspiritiĝo kun akcento de la diismo kaj la poeton mem kiel izolulon en ebura turo. Sed kiam la nova barbarismo iĝis la gvida tono tuj antaŭ la dua mondmilito, ankaŭ Gullberg forlasis la eburan turon kaj en parnasaj poemoj venis la akcento sur la parnasan liberon, primokitan en nia epoko.

Liaj "Spiritaj ekzercoj" aperis jam en 1932 kaj prezentas la ekstreman maltrankvilon de la poeto. (Unu el

liaj poemcikloj trovis kungenian komponiston en Lars-Erik Larsson per la ĥorverko "Maskita dio".) Gullberg batalas por la homaj idealoj eĉ per la armilo de la satiro. En la facila "Ciela enciklopedio" aperinta en la frua periodo de la nazismo jene li rimas ĉe la litero "P":

*Pallas Atena, prudento, saĝ' en animo.*

*Ekziligita. Fuĝinto jam trans la limo.*

Hjalmar Gullberg ne estis nur delikate arta virtuozo de la poezio, sed ankaŭ eminenta tradukisto, kies granda tradukprodukto ampleksas de Euripido ĝis F. Garcia Lorca.

Fine ni citu unu el liaj pli fruaj poeziaĵoj, multrilate tre tipa pri la tre funebrata, simpatia poeto de Svedujo:

## Lulkanto

*Ripozas ĉio monda;  
Infan' kaj balancilo.  
Jam falas formortonta  
La vort' de l' viro.  
De kerno falas ŝelo,  
Eĉ ĉesas eta bru'.  
Ne plaŭdas la kverelo  
virina plu.*

*Li kiu regas, baras  
ja ĉion, teron, ondon,  
— en man' kun glob' — li staras  
por pesi l' mondon.  
Jen vibras stelo-ringoj  
Ĉe lia kap', sed sub  
la nuboj, sur la fingroj  
nur estas sang' kaj rub'.*

El la sveda: F. Szilágyi.

# EDVARD MUNCH KAJ LA GRAFIKO



*E. Munch: Memportreto (ĉ. 1912).*

Edvard Munch, la mondfama kaj tre grava pentristo de la norvegoj, naskiĝis en 1863 kaj mortis en 1944. Lia arta diraĵo jam en liaj komencaj pentraĵoj diferencis de la tiam moderna, analizema kaj socia naturalismo. Lia humana sento, lia subjektiveco serĉis la tonojn de la elinterne radianta agordo, kiun li metis antaŭ la eksteran formkonstruon. Pri eksteraj detalemo de formoj oni apenaŭ povis paroli, sed la ŝparemajn eksterajn efikojn multoble plifortigis jam

tiam la sugesta, opozicia interna forto. Munch, kiel multaj longvivaj pentristoj transiris diversajn grad-ojn de la evoluo kaj entute lia arto prezentas al ni verkaron, kiu meritas, ke okaze ni revenu per pli longa artikolo je tio. Nun sufiĉas tiom, ke antaŭ la jarcentoturno estis pasiaj diskutoj en kontakto al liaj verkoj, kiuj iom post iom proksimiĝis al la ekspresionisma monumentaleco. Pri tio atestas la grandiozaj freskoj de la universitato de Oslo.



*Studo (1912).*



*E. Munch: Melankolio (1900).*

Proksimume ĉe la jarcenta turno komencis Munch intense okupi sin pri la grafika arto kaj la rezulto estis forte persona grafika stilo. El liaj verkoj grafikaj ni aperigas jen kelkajn. Al izolulo, ĉar li estis dum sia tuta vivo tia, la grafikaĵoj estas ofte senperaj esprimiloj kaj ili donas valorajn klarigojn pri la individuo de la artisto. Antaŭ 1900 li serĉis simbolojn al sia animo kaj ĉefe al la vivangoro. Lia origina egocentrismo iom post iom riĉiĝis per pli ĝeneralaj esprimoj

kaj efikoj, rezultoj de lia proksimiĝonta maljuneco kaj de pli kaj pli brutalaj tempoj. Munch havis tre senteman nervistemon. En la komenco de nia jarcento li pasigis iom da tempo en nervkliniko en Kopenhago. Sed ĉ. 1910 li revenis post vagado en diversaj landoj, denove al Norvegujo kaj iĝis kaptita de la travivo pri la naturo. Lia rigardo perdas sian ekskluzive sinserĉan karakteron, ĝi profundigas en la kosmon kaj en la homon en pli ĝenerala senco ol pli frue. Liaj

grafikaĵoj, ksilografioj aŭ litografajoj, kiuj komence same kiel liaj pentraĵoj prezentis fermitan mondon de amara poeto, kune kun la matura aĝo kaj maljuniĝo modifiĝas je trankvilaj esprimoj de la viro, kiu jam vidis ĉion, scias ĉion, sed estas pozitive instalita al la vivo.

Ke kun tiaspeca vivmaturiĝo sekvas grava simpligo en la formoj, rakontmaniero aŭ analizado, tion oni povas sperti preskaŭ ĉiam, kiam granda artisto pro favoro de la sorto, en plena spirita sano atingas altan aĝon. Munch testamentis amason da pentraĵoj skizoj, grafikaj verkoj — granda kaj grandioza kolekto, — al la urbo Oslo.

S. Császár:


## Ankoraŭ lasfoje...

*Miaj pensoj restis ĉe vi tie,  
vane mi volis forgesi nur vin,  
kvankam vi malamas eterne min,  
tamen mi serĉas vin ĉiam nun ĉie.*

*Sur miaj koraj kordoj ploras kanto,  
pri arbaro, somer' kaj montoval',  
pri rozkolora kora amvual',  
pri silka herbtapiŝo de l' fontrando.*

*Sed ve! La susurantaj arbigantoj  
jam surombrigis mian mienon,  
nigraj nuboj kovris la ĉielon.*

*Malĝoje silentiĝis miaj kantoj,  
ekflagras ankoraŭ jen mia kor',  
aspergas vangojn treme mia plor'.*



E. Munch: Laboristoj en la aleo. (Ĉ. 1920.)

## LA DIA PROVIDENCO

— Ne povas esti optimistaj kaj esperantaj vi, kiuj ne kredas la dian providencon kaj nomas la miraklon hazardo — diris la saĝa viro. — Nur kiu spertis multe en sia vivo, kiu multfoje iradis sur la vojo de la pezega provo, nur tiu scias kion signifas en decidaj momentoj, kiam temas pri vivo aŭ morto, tiu hazarda io, kiu solvas la problemon, kiam ŝajnas jam ĉio perdota... Je via sano!

Kaj la saĝa viro sorbis modere el la abrikotbrando.

— Rakontu patro, — mi instigis lin, bone konjektante ke nun ni aŭdos ion pri liaj afrikaj aventuroj.

Li pensadis, poste komencis decide:

— Tio okazis borde de la Zambezi, en la praarbaro... Restinte malantaŭ miaj ĉasistkamaradoj, mi erarvagadis sola, meze de la implikiĝintaj lianoj... Tiam subite barbarona batalkrio trafendis la timigan silenton kaj la sekvan momenton aperis duonnuda, sovaĝa gorilo, kiu sen spuro de homecaj sentoj, klakigis siajn dentojn kontraŭ mi, dume ĝi ŝiretadis sian longan vangobarbon. Ĝi jam estis ĵetonta sin al mi, kiam abrupte sago traboris la aeron, trafante la frapadantan rostron de la gorilo... Post la gorilo elsaltadis ruĝpentritaj negroj el inter la arboj, kaj komencis ĉaspeli min... Mi sukcesis sekurigi min de ili, kaŝante min en la densejo, sed tiam ekbruliĝis la arbaro pro la varmeĝo... Mi devis rifuĝi... Restis nur unusola pado, sed sekvis miajn paŝojn la furiozantaj mongoloj kaj la brulanta arbaro... Kiel dirite, la pado estis kondukanta al la bordo de Niĝero, kaj jam ŝajnis ke

mi sukcesos atingi sendanĝeran spacon transnaĝonte la riveron... ĉar returniĝi estus signifinta certan morton... Bedaŭrinde, tio ne sukcesis. Tuj kiam mi estis ĵetonta min en la ondojn, aperis ĉirkaŭ mi naŭ krokodiloj kun terura plaŭdegado, ekbarante la vojon de la rifuĝo. Se mi faros eĉ nuran paŝon, ili tuj englutos min...

— Nu kaj? — mi instigis la saĝan viron, dum mi denove verŝis.

— Nu kaj? — ankaŭ li demandis sin mem, kvazaŭ miregante pro tio, kiel li povis eliri el la kaptilo.

— Nu kaj? — ripetis mi nun jam iom severe.


— Nu kaj, — altigis la voĉon la saĝa viro — nun venis la dia providenco.

— Eble aglo?...

— Tute ne! Dio ne bezonas tiajn altruditajn solvojn. En la lasta momento, kiam la krokodiloj jam estis malfermontaj la buŝegojn, malkaŝiĝis... malkaŝiĝis, ke el la tuta historio rakontita nun al vi, eĉ unu vorto ne estis vera! Tiel mi povis saviĝi el tiu terura situacio, sekve de la nepenetrebla saĝeco de Dio!

Elhungarigis: *Dro Kussinszky K.*

Noto: La "saĝa viro" volas plue plialtigi la atenton de la aŭskultantoj, tial li parolas pri la "rostron" de la gorilo kaj "mongoloj" en Afriko.





## Lamento pri Ignacio Sanchez Mejias (1935)

### I.

#### LA TRAKORNIGO KAJ LA MORTO

*Je la kvina de vespero.  
Estis ĝuste la kvina de vespero.  
Knabo alportis la blankan littukon  
je la kvina de vespero.  
kaj jam korbo kun kalko estis preta  
je la kvina de vespero.  
La vento levis vaton en aeron  
je la kvina de vespero.  
La resto estis morto, sola morto  
je la kvina de vespero.  
L' oksido semis vitron kaj nikelon  
je la kvina de vespero.  
Kolombo luktis kontraŭ leopardo  
je la kvina de vespero.  
Femuro kontraŭ korno desperinta  
je la kvina de vespero.  
Komenciĝis la basa sonorado  
je la kvina de vespero.  
Sonoriloj de fumo kaj arseno  
je la kvina de vespero.  
Silentaj homoj ĉe la stratanguloj  
je la kvina de vespero.  
Kaj nur la taŭra koro furiozis  
je la kvina de vespero.  
Kiam la ŝvito iĝis kiel neĝo  
je la kvina de vespero.  
Kiam l' areno kovris sin per jodo  
je la kvina de vespero.  
La morto metis ovojn en la vundon  
je la kvina de vespero.*

*Je la kvina de vespero  
Guste je la kvina de vespero.  
Cerko kun radoj iĝis lia lito  
je la kvina de vespero.  
Ostoj kaj flutoj sonis en l' oreloj  
je la kvina de vespero.*

*La taŭro muĝis jam ĉe lia frunto  
je la kvina de vespero.  
La ĉambron kolorigis agonio  
je la kvina de vespero.  
Jam malproksimen venis la gangreno  
je la kvina de vespero.  
Lilia rostro ĉe l' ingveno verda  
je la kvina de vespero.  
La vundoj brulis flame kiel sunoj  
je la kvina de vespero.  
Kaj homamaso rompis la fenestrojn  
je la kvina de vespero.*

*Je la kvina de vespero.  
Kia terura kvina de vespero!  
Estis la kvina en ĉiuj ajn horloĝoj!  
Estis obskura kvina de vespero!*

El la hispana: K. Gusev (Moskvo).

#### Ernest Hemingway (1899–1961)

Hemingway, la centra figuro de la usona literaturo, forlasis la mondon, pri kiu li ne havis iluziojn. Ankaŭ la eta majstroverko, "La maljunulo kaj la maro" kiu en 1954 akiris al li la Nobel-premion tre fortefekte atestas pri tio: la maljuna fiŝisto fine atingas sian sonĝon, la plej grandan fiŝon, kiu havigos al li famon kaj ĉion. Li venkas la fiŝon, kies korpon li ligas al sia boato, sed kiam li atingas la havenon, el la fiŝo restas nur skeleto. La simbola lingvo de tiu bela libreto estas tute klara kaj ankaŭ ĝi impresas nin en la diskuto, ĉu Hemingway mortis pro akcidento aŭ li mem iniciatis akcidenton, por la lasta varianto. El la skepticismismo kaj pesimismo, kiu kunplektiĝis kun iaspeca adoro de la vivo, post ĉio nun fine restis nur la maljuno kaj la morto.

## EKSTER LA SEZONO

Jan Labáth (n. 1926) estas jugoslaviano, poeto ankau en la slovaka lingvo, pri kio atestas lia slovaka poemaro kaj kontribuajoj al la literaturo revuo "Novi Zivot". Per E-poeziajtoj li kunlaboris i. a. en "La Suda Stelo", kaj en la ĵus aperinta Stafeto-libro "Reeĥoj".

En la kafejo estis okupitaj nur du tabloj: ĉe unu sidis germane parolanta paro, ĉe la alia kartludantoj. Kelnerino ĉe la servtablo ŝajnis kontenta pri si. "Kiel kuras la vivo" ŝi diris al iu. Apud ŝi estis radio funkcianta. Estis mallaŭta sudamerika sambomelodio.

Senkonfide mi rigardis la ejon, tapiŝojn, pluŝkurtenojn kaj la neokupitajn tablojn.

"Ĉu ni eniru?" demandis Elena.

"Ni venis ja por tio" mi respondis kaj pensis, ke estis iom korpreme ĉi tie.

Transirinte longan brunan tapiŝon inter la tabloj, aspektantaj iom tro multaj, ni sidiĝis ĉe fenestro. La kafejon oni establis por cento da homoj kaj malagrabla sento vekis la scion, ke tiuj ne venos. Dum nia eniro la germane parolanta viro levis la rigardon, la ceteraj ne rimarkis nin.

Elena havis hirtetajn harojn, per frosto pikitajn vangojn kaj senreviĝojn sur ŝia ovala vizaĝo. "Ĉu vi povus pensi, ke oni tiel ekzistas ĉi tie?" ŝi diris, en la voĉo kun nekaŝita dozo da melankolio, dum ŝi konfuzite traserĉis ledsakon. Splendid, la kafejo, estis nia memorata loko. Ĉi tie ni interkonigiĝis, pri ĝi ni parolis kun tenera omaĝo, kaj kiam nun ni revenis fine ĉi tien, ni spertis, ke sonĝoj es-

tas same vundeblaj kiel la vivo mem.

"Dum la sezono estas pli interese ĉi tie" mi respondis kaj rigardis ŝian profilon, kiun kaptis la projekcio de la malhelruĝa ĉerizokoloro de la pluŝkurteno, ŝian altan, obstinan frunton, nazon kun apenaŭ videbla ondaĵeto kiu min ĉiam tiel emociigis, ŝian konveksan mentonon...

"Ĉi tie estas hodiaŭ... malgaje" ŝi diris malcerte, time, kvazaŭ ne hontigi la lokon, kie ŝi trovis iam feliĉon. Mi trarigardis la ejon kaj denove ventumis min la malvarmo. *Ni sidis tie*, mi pensis, rigardante la tablon ĉe la pordo, *Elena havis rozkoloran dekoltitan robon kaj kanton de vekiĝinta printempa arbaro en la okuloj*. Subite mi sentimentaligiĝis. Al la prudento venis sentoj, pri kiuj mi ne sciis, ke ili kunligas miajn plej kovritajn pensojn, ĉiam forpelitajn — kaj mi sentis korprenon.

"Ĉu vi deziras?" aliĝis la kelnerino kompleze.

"Teon, ĉu ne?"

"Teon kun frambo" aldonis Elena.

"Mi pensas, ke oni tiel kutimas ĉi tie.

"Povus esti kun rumo."

"Ne, ĝi estu kun frambo."

"Du teojn kun framboŝiro" ŝi ripetis kompleze kaj foriris. Ni sidis longtempe ĉe malgranda ronda tablo en duonhejtita ejo, en forgesita somera kafejo, kaj ni sentis nin sorĉitaj, kiel spektanto rigardus la kulisojn en la teatro de interne, la heroojn same deinterne kaj trovus nur tre ĉiutagajn homojn el la strato. La konversacio ekstumbliis. Mortsezona atmosfero efikis per impreso de tempomorto. La teo havis guston de dolĉvarmeta

akvo, kaj la cigaredfumo ĉirkaŭprenis la tablon kiel funebra vualo de forfluintaj jaroj. Mallumiĝis. La germane parolantoj meditante trinkis kafon. Ĉe la alia tablo oni trankvile kartludis. Ankoraŭ unu viro envenis. Li sidiĝis apud la forno kaj diligente trarigardis amason da gazetoj. Li havis orajn okulvitrojn kaj razitan vizaĝon.

Sur la nebuligita fenestro moviĝis akvogutoj. Mi frotis la nebuliĝintan vitrotabulon kaj tra ĝi aperis peco de lagsurfaco vualita de vesperkrepusko. De oriente ekbrulis la lumoj de frekventata hotelo, la alian bordon ĉirkaŭprenis la frosta prujno. Fantome efikis magazenoj de boatoj, amasigitaj benkoj, lumavaraj lumturoj, estingo de ĉio, kio ĉi tie reprezentis la vivon.

Kaj tiam en mi aperis penso, ŝajne ne ligita al la forlasitaj aleoj, senvivaj surskriboj sur vitropordoj, ŝildoj kaj tabuloj. "La tempo fluas!" mi diris ĝin laŭte kaj enpensigis la sunhorloĝon en la antikva kastelo, ne tre fore. *Tre multaj estis la suntagoj.*

Elena ektimis, oni povis vidi, ke ankaŭ ŝiaj pensoj ekvagadis kaj ŝi malrapide balancis la kapon. *Kiel nun fartas Elena? Ĉu ankaŭ ŝi ekvidis en ĉi tiu momento la nematerian araneon, varpantan sur fruntoj la perfidajn fadenojn de sulkoj? Ŝajne el la purpuro de ŝiaj tremantaj lipoj ree ekfluis sonĝo.* Kiam mi estis lastfoje ĉi tie, ŝi havis 19 jarojn kaj karakteron de granda infano, al kiu nenio estas neatingebla. *La tempo fluas.*

Mezurinte ŝin per esplora rigardo mi kompatis ŝin. Poste mi returnis la rigardon al la fenestro kaj la vortoj, neatendite ekdiritaj de ŝi ŝajnis al mi alvenintaj de ekster la vitrotabulo:

"Ni ne rajtis veni ĉi tien, Pavel."

En ŝiaj okuloj miksiĝis krio de mal-

## Kalevipoeg 100-jara

Post la morto de la unua iniciatanto, F. R. Fählman, alia estona scienculo F. R. Kreutzwald (kuracisto, esploristo de etnologio, ĉefe de popolpoezio, 1803—1882) daŭrigis la laboron kaj surbaze de popola poezio estona, elformis la grandan estonan eposon, Kalevipoeg. La eposo, kies efiko estis same granda kiel tiu de Kalevala en Finnlando, en siaj 20 kantoj rakontas pri la giganto Kalevipoeg, liaj bravuraĵoj kaj aventuroj. La plej granda parto de la eposo estas originala popolpoezio, la reston formis Kreutzwald kun eminenta talento tiel harmonia, ke la tuta verko efikas kiel popola eposo. Ĝi iĝis unu el la plej ĉefaj faktoroj de nacia vekigo en Estonio. Laŭ nia intenco aperos en nia venonta numero karakteriza parto el la eposo omaĝe al jubileo, kiu nun estas aktuala: Kalevipoeg atingis sian kompletan elformiĝon en 1861.

---

espero kun malnova melodio de boatoj en somera nokto. Delikate mi premis ŝian manon.

Oni lumigas la lustrojn de la ejo kaj kuntiris la kurtenojn. La germane parolanta paro foriris: ĵus palpebrumis du lumoj de nigra Mercedes. El la okcidenta flanko de la lago, ĉirkaŭita jam neĝstampitaj montoj, disvastiĝis griza nebulo. Ĝi moviĝis eksterordinare rapide.

Elena krampe premis mian manon kaj diris:

"Ni veturu per la unua vagonaro!"

Ŝajnis al mi ke ŝi ne estas malproksime de la ploro.

---

**Vi gajnas, al ni utilas, se ni ricevos jam nun vian jarabonon por 1962. Koran dankon!**

## LEONARDO DA VINCI

En la kosma epoko ofte oni ekmemoras pri la arta genio, kiu ne estis nur mirakla artisto, sed ankaŭ intuicia pioniro de scio kaj sciencoj, kiuj nur jarcentojn post li maturiĝis. Pri ĝusta kompreno kaj profunda kono atestas la heredaĵo: amasaj notoj de la geniulo. El ĉapitro pri "La renesanco" okupiĝanta pri Leonardo da Vinci ni citas karakterizajn partojn por iel alproksimigi tiun ĉi mirindan animon. Pater Walter estis angla esteto (1839—1894), li mem estis brila intelekto kaj granda stilisto.

La malbeno de la eksterleĝa naskiĝo premis lin. Lia patro, Pierio Antonio devenis el aristokrata familio el Vinci, en la valo de Arno, kaj li edukis Leonardon kune kun siaj legitimaj infanoj en sia domo. En la infano de la amo ekzistis tiu prudenta, firma frumatureco, kiun ĝuste ĉe tiaj infanoj ofte oni povas trovi. Ni vidas, ke jam kiel junulo li ravas la homojn per sia korpa belo, sen instruo li kantas kaj muzikas, aĉetas kaĝbirdon por poste liberigi ĝin kaj havi pro tio plezuron, kaj montras sin sur la stratoj de Fiorenza en belega vesto kaj sur obstina ĉevalo, kiujn ambaŭ egale li ŝategis.

*(Leonardo baldaŭ prezentas sian artistan talenton kaj iĝas disĉiplo de Andrea del Verocchio.)*

... Okazis tiel, ke Verocchio ricevis la taskon de la sanktaj fratoj en Vallombrosa, ke li pentru la bapton de Kristo. Li komisiis al Leonardo fini la maldekstran anĝelon de la bildo. Ankaŭ tio estis unu el la grandaj momentoj, kiuj decidis pri la evoluo de granda ideo. Tiufoje temis pri la itala arto kaj progreso. La feliĉo de la unuopulo senindulge kaj devige

subpremiĝis, sed per ties malkuraĝiĝo kaj bariĝo la alia, la elektito svingiĝis per potenca paŝo al la perfektigiĝo... Per tiu ĉi Baptanto la disĉiplo forte superis sian majstron kaj kiam Verocchio ekvidis la kvazaŭ pro lumo brilantan, vivoplenan etan anĝelon, kvazaŭ ektime, mirante, duonsvene turnis sin de la bildo iel konjektante jam, ke depost tiam lia propra arto ne povos doni plu al li ĝuon kaj ke la propra arto estas sengusta kaj ne plu vivkapabla.

*(Sed la pedanta, detaliĉa "artistudustria" stilo ne estis sensignifa en la anima evoluo de Leonardo:)*

... Tiu ĉi estis la supera grado de la evoluo en la fiorenza miniaturpentrado, la, ĝis la plej etaj detaloj ellaboritaj folieto kaj floro, ĉu sur la arbotrunko, ĉu en la herbo, sur kiu la unua homparo staris.

Kaj ĝuste tial, ĉar tio prezentas la plej supran evolugradon de tiu ĉi artistilo, povis vekiĝi en Leonardo la sento de malkontentiĝo, kiu latentis en la plej profundo de lia animo, en ĝia plej sekreta angulo. Ĉar la vojo de la perfekteco gvidas tra sennombraj malkontentecoj. Kaj ĉiu lia pentraĵo, kiun li pentris tie en Fiorenza, kreiĝis ĝuste en tia facila direkto. Por ke lia arto graviĝu en la mondo, estis necese, ke ĝi pli bone respegulu la naturfenomenojn kaj la celon de la homaro. La naturo estas la vera instrumajstro por la supera inteligento. Tial li donis sin al la trankvila observado de la naturo kaj farante tion li uzis la metodon de malnovaj majstroj. Li sagacis, kontempladis, esploris la sekretajn ecojn de la plantoj kaj kristaloj, priantis la movon de



*Leonardo da Vinci: Militistoj (Belarta Muzeo, Budapeŝto).*

la astroj sur la ĉielo kaj provis konstati la hierarkion de la diversaj estaĵoj esplorante tiujn komunajn rilatojn, kiuj klarigas unu la alian; liaj samepokanoj rigardis lin kiel iun, kiu aŭskultas sonojn, kiuj estas mutaj por ĉiuj aliaj.

Per tiu ĉi metodo li lernis esplori la plejprofundon de la aĵoj, sekvi la originon de esprimiĝo laŭ plej implikitaj vojoj kaj serĉi la internon de la aferoj, kiuj lin okupis. Sed samtempe li ne tre forgesis pri siaj kreaĵoj; sed li ne plu restis la gaja fiorenza pentristo, tra kies animo kiel tra iu

vitrotabulo, la brilaj figuroj purigitaj kaj idealizitaj aperis sur la blankaj muroj. Li disipis semajnojn kaj monatojn per la plej strangaj desegnoeksperimentoj, liniaj sistemoj kaj kolormiksadoj. Febre li esploris la neatingeblan, li volis trabori la internon de la montoj, novan fluejon li volis fosi al la riveroj, gigantajn konstruaĵojn li volis eligi el ĝia loko por plialtigi ilin kiel la preĝejon de Sankta Giovanni... Du aferoj restis en li ĝisfine potence kaj neestingeble: la movoj de la virina rideto kaj tiu de la grandaj akvoj... Trad. K. S.

# BANI LA BEBON

(Daŭrigo kaj fino.)

"Ni ne ŝatas vestaĵojn, ĉu-ĉu?" diris la patrino. "Ni volas refali en la kuvon. Ni ne multe volas vestaĵojn, ĉiukaze. Ni 'stas eta hotentoto, ĉu ne?"

Kaj, malrapide, ŝi kovris lin per tiu aŭ alia vestaĵo, ĝis restis nur liaj kapo, manoj kaj piedoj. Kaj ŝi sidigis lin rekte sur siaj genuoj, por butonumi liajn vestaĵojn malantaŭe. Kaj tiam estis rimarkinde, ke li ne plu laŭte spiris, sed eligis bructon inter rido kaj krio, dum li suĉis sian dikfingron kaj ĉirkaŭrigardis.

"Tio estas nia eta afekta krio, kiun ni faras por nia lakto, ĉu ne?" la patrino klarigis al li; kaj li konsentis.

Kaj antaŭ ol Emmie povis transflugi la ĉambron por la jam preta, atendanta botelo, lia buŝo, en perfekta rektangula formo, okupis kvin sesonojn de lia vizaĝo, kaj li estis skarlata, kaj pro malpacienco muĝanta.

Li ekkaptis la botelon kiel tigro sian predon, kaj kaptis la patrinan manon kiu tenis la botelon, kaj furioze pumpis la lakton en la nesatigeblan abismon de sia stomako. Sed li trovis tempon ankaŭ por ĉirkaŭrigardi la ĉambron. Larmo restis en ĉiu okulo, pro la mangostrebado.

"Jes, ĝuste tiel," diris la patrino. "Nun ĉirkaŭrigardu kaj vidu, kio okazas, Scivolulo! Do, se vi insistas movi la kapon, ne kulpigu min."

"Kompreneble vi kulpas!" la var-tistino sinrege ne diris.

Tiam la bebo metis sian fingron en la buŝon, flanke de la botelo, ŝtopis sin, eksufokis sin kaj eligis teruran

(pardonon) singulton. Poste li kvazaŭ perdis intereson pri la lakto, kaj la pumpa laboro malvigligis, poste ĉesis.

"Ansereto!" flustris la patrino, "do'mema? Ĉu la sablovendisto ŝutas sablon en la okulojn? Maljuna sablovendisto... Ŝŝ..." Li ekdormis.

Emmie prenis lin. La virinoj interflustris. Kaj sinjorino Blackshaw, pasiginta la tagon kiel patrino, reigis sin edzino kaj komencis beligi sin por sia edzo.

## II

Jes, estis sinjoro Blackshaw, kaj kun tiu sinjoro Blackshaw komenciĝas la tragedio de la bano. Sinjoro Blackshaw estis tre grava juna viro. Estus eĉ permeseble diri ke, post lia filo, li estis la plej grava juna viro en Bursley. Ĉar sinjoro Blackshaw estis la direktoro de la ĵus malfermita Urba Elektrejo. Kaj la Urba Elektra Kompanio kreis pli grandan sensacion kaj intereson ol io ajn ek de la Jubileo de 1887, kiam tuta bovo estis rostita en la placo kaj dume putris. Se Bursley estus svisa vilaĝo, aŭ franca kampara urbo, aŭ domgrupeto en Arizona, ĝi estus havinta elektron antaŭ dekkvin jaroj, sed, estante nur progresema angla urbo, kun ĉiujara valoro de centkvin mil pundoj, ĝi daŭrigis tedan laboron kun gaso ĝis ne tre frue en la dudeka jarcento. La granda najbara urbo, Hanbridge, konatiĝis kun elektro dum la deknaŭa jarcento.

Ĉiuj ĉefstratoj kaj placoj, ĉiuj indaj vendejoj kiuj restis post la intensa konkurado en Hanbridge, kaj mul-

taj privataj domoj, jam ekuzis elekt-ran lumon; kaj la rezulto estis impo-na kaj brilega kaj malvarme flava. Sinjoro Blackshaw iĝis la heroo ak-tuala. Homoj en la strato rigardis lin kvazaŭ li estus la trovinto kaj unua fabrikanto de elektro. Kaj la gasdi-rektoro ankoraŭ ne murdis, nur ĉar li havis ĝustan komprenon pri respekto al sia situacio kiel preĝeja oficisto en la preĝejo de Sankta Petro.

Sed eminenteco alportas siajn ĝen-ojn. Kaj la ĉefa ĝeno de la eminente-co de sinjoro Blackshaw estis, ke li ne povis vidi kiel Roger baniĝis ĉiunok-te. Ne eblis, ke sinjoro Blackshaw forlasu sian postuleman kaj respon-decan laboron antaŭ la sepa vespere. Estontece, kiam ĉio iros pli glate, li eble povos eskapi; sed estontence la bano de lia filo ne estos tiel amuza kaj agrabla kiel nun. Kompreneble oni banis la bebon ankaŭ dimanĉ-vespere; sed sinjoro Blackshaw devis pasigi la dimanĉan posttagmezon kaj vesperon ĉe sia malsana patrino en Longshaw. Nur kondiĉe de lia ĉiuse-majna tia ĉeesto ŝi konsentis ne loĝi kun la geedza paro. Tial sinjoro Blackshaw ne povis vidi la banon de Roger. Li adoris la bebon. Li kom-prenis lin. Li pesis, vartis, nutris lin. Mallonge, Roger estis lia obsedo, kaj li sciis ĉion pri Roger, escepte de la bano. Kaj kiam, je la sepa kaj duono vespere, lia edzino renkontis lin ĉe la pordo kaj tuj komencis preparoli la mirindaĵojn, ĝojojn kaj emociojn de la lasta bano de Roger, sinjoro Black-shaw sentis sin preta elŝiri la hararon pro malkontento.

"Ne estus eble, ĉu, ke vi povus malfruigi ĝin dum du horoj unu ves-peron, May?" li sugestis dum la ves-permanĝo je la vespero de tiu bano, supre priskribita.

"Sidney!" protestis sinjorino Black-shaw, ŝokite.

Sinjoro Blackshaw sentis ke li tran-siris la limon de deco, kaj silento oka-zis.

"Nu!" diris sinjoro Blackshaw fin-fine. "Mi ĵus plendecidis. Mi intencas vidi la banon de tiu bubo, kaj plie, mi vidos ĝin morgaŭ. Okazu kio ajn!"

"Sed kiel vi aranĝos eliron, karu-jo?"

"Vi telefonos al mi, proksimume kvaronhoron antaŭ ol vi estos preta komenci, kaj mi kredigos, ke estas ia urĝega afero, kaj ek, for!"

"Nu, estos bonege, karulo!" diris sinjorino Blackshaw. "Mi vere volas, ke vi unufoje vidu lin en la bankuvo. Li aspektas tiel..."

Kaj tiel plu.

La sekvan tagon, sinjoro Black-shaw, timata aŭtokrato de la Urba Elektrejo, diradis al si mem dum la tuta tago ke li ĉeestos tiun spektak-lon, la banadon de sia mirinda filo. La penso inspiris lin — tiom, ke ĉiu mano en la Elektrejo laboris kiel eble plej vigle, time kaj treme, kaj ĉio iris precize kaj glate kiel horloĝo.

Ek de la kvara, sinjoro Blackshaw, en la formala, lumigita aparteco de la direktora oficejo, sekura malantaŭ vitraj vandoj, ne povis plu regi sian ekscitecon. Li hezitis antaŭ la tele-fono kaj atendis eksonoron. Tiam, je kvarono antaŭ la kvina, ĝuste kiam li sentis, ke li ne povas plu elteni, kaj volis telefoni al la edzino anstataŭ atendi ke ŝi telefonu al li, vidis lar-ĝan ombron malantaŭ la vitra vando, kaj senespere vespiris. Nur unu homo povis ĵeti tian ombron, kaj tiu per-sono estis lia Moŝto, la Urbestro de Bursley. Lia Moŝto, kun urbestra memfido, eniris la privatan oficejon, kaj tiris post si dikan maljunulinon, kiun li prezentis kiel sian onklinon el Wolverhampton. Kaj li trankvile proponis, ke sinjoro Blackshaw mon-

tru al la urbestronklino la novan Elektrejon!

Tiaj montradoj jam tedis sinjoron Blackshaw. Li ankaŭ malestimis la urbestron — nature, ĉar ĉiuj konstantaj oficistoj en urboj malestimas siajn urbestrojn (sekrete). Urbestro ĉeestas hodiaŭ, malestas morgaŭ, dum konstanta oficisto estas konstanta. Urbestro scias nenion, krom sia insigna kolĉenego kaj la reguloj de publika debato, kaj li estas ankaŭ homo enuiga kaj enŝoviĝema — laŭ la opinio de konstantaj oficistoj.

Tial oni povis imagi la koleregon de sinjoro Blackshaw pro la alveno de la Urbestro kaj la urbestronklino je tiu grava momento. Plej malbone estis, ke li ne sciis, kiel rifuzi al la Urbestro.

Tiam la telefono eksonoris.

"Pardonu min", diris sinjoro Blackshaw, admirinde ludante ĝentilecon kaj irante al la telefono. "Ĉu vi ĉeestas? Kiu parolas?"

"Estus mi, karulo", diris la malforta voĉo de la edzino, malproksima en Bleakridge. "La akvo nun varmiĝas. Ni estas preskaŭ preta. Ĉu vi povus veni nun?"

"Je Jupitero! Atendu dum momentoj!" krietis sinjoro Blackshaw, kaj turnante sin al siaj vizitantoj: "Ĉu vi aŭdis tion?"

"Ne", diris la Urbestro.

"Ĉiuj el tiuj tri novaj dinamoj, kiujn ili havas ĉe la Elektrejo en Hanbridge, ĵus malfunkciiĝis. Mi sciis, ke tio okazos. Mi avertis ilin."

"Ho ve, ve!" diris la Urbestro de Bursley, sentante sekretan plezuron pri tiu ĉi katastrofo ĉe malestimema rivalo. "Nu, la urbo estos en mallumo. Kion ili faros?"

"Ili volas, ke mi iru tuj. Sed kompreneble mi ne povas. Almenaŭ mi devos unue doni al mi la plezuron

montri la Elektrejon al vi kaj al tiu ĉi sinjorino."

"Ne, tute ne, sinjoro Blackshaw!" diris la Urbestro. Iru tuj. Iru tuj. Se Bursley povos iom helpi al Hanbridge en tia krizo, mi estos eĉ tro ĝoja. Ni venos morgaŭ, ĉu ne, onjo?"

Sinjoro Blackshaw parolis al la telefono.

"La Urbestro estas tie ĉi, kun sinjorino, kaj mi intencis montri la Elektrejon al ili, sed lia Moŝto insistas, ke mi venu tuj."

"Certe", kontribuis la Urbestro, singravige.

"Mirakloj daŭre okazas," diris la malforta voĉo de sinjorino Blackshaw tra la telefono. "Estas tre afable lia parte. Kia estas lia kunulino?"

"Nenia. Unika!" respondis sinjoro Blackshaw.

"Ĉu juna?" diris la voĉo.

"Ekestis je proksimume 1830," diris sinjoro Blackshaw. "Do, mi venas!" Kaj li demetis la telefonon.

"Mi ne sciis, ke ekzistas elektraj aparatoj tiel malnovaj," diris la urbestronklino.

"Ni ĉirkaŭrigardos iomete," diris la urbestro. "Ne perdu eĉ momenton, sinjoro Blackshaw."

Kaj sinjoro Blackshaw rapidis for, iom demandante al si kiel li klarigos la mensogon kiam oni ekscios ke ĝi estas falsa; sed pri tio li ne multe ĝenis sin. Li povos facile kulpigi iun ŝercemulon.

### III

Li atingis sian grandan kaj elektre lumigitan domon ĝustatempe, kun preskaŭ superfluenta patra ĝojo. Ĉu li ne vidos la banon de Roger? Roger estis ĝuste preta portiĝi supren, kiam la ŝlosilo de sinjoro Blackshaw turniĝis en la pordo.

"Atendu sekund!" kriis sinjoro



Blackshaw al la edzino, kiu tenis la infanon en siaj brakoj, "Mi portos lin supren."

Kaj li forĵetis siajn ĉapelon, bastonon kaj surtuton, kaj ekstaze ekkapitis la infanon. Li estis eble ĉe la mezo de la ŝtuparo, kiam jen! la elektra lumo malfunkciĝis. Ĉiu elektra lampo en la domo estingiĝis.

"Al la diablo!" vesperis sinjoro Blackshaw, konsternite.

Li tiris la ŝtuparfenestran kurtenon flanken, kaj elrigardis. La strato estis nigra kiel lia ĉapelo, aŭ preskaŭ tiel.

"Al la diablo!" li ripetis. "May, trovu kandelojn."

Evidente, io misfunkciis ĉe la Elektrejo. Jen lia sorto! Li forestis dum kvaronhoro, kaj la kurento ĉesis!

Kompreneble la tuta hejmo tuj ĥaosigis, renversiĝis, ŝokmortis... sed kelkaj kandeloj baldaŭ trankviligis ĝiajn ekscitojn. Kaj finfine sinjoro Blackshaw sen akcidento atingis la litĉambron, kun la ido, pri kiuj liaj deziroj temis, komforta en ŝalo.

"Donu lin al mi," diris May supozas, ke vi devos tuj reiri al la Elektrejo?"

Sinjoro Blackshaw paŭzis, poste kuraĝigis sin; sed, dum li paŭzis, May, rigardetante la du malfortajn kandelojn, diris: "Estas tre ĝene. certe mi ne povos vidi adekvate."

"Ne!" preskaŭ kriegis sinjoro Blackshaw. "Mi vidos la banon de la bubo aŭ pro tio mi pereos! Ne gravas al mi, se ĉiuj KvinUrboj estas en mal-lumo. Ne gravas al mi, se la onklino de la Urbestro implikiĝis en dinamon kaj terure torturigas. Mi venis por vidi tiun ĉi ban-aferon, kaj mi estu damnita, se mi ne vidos ĝin!"

"Do, ne staru inter la bankuvo kaj la fajro, plej kara," diris May malvarme.

Dume, Emmie, preskaŭ pleniginte la bankuvon per miksaĵo de varma

kaj malvarma akvoj, enfaligis la floskapablan termometron, kaj aldonis novan akvon ĝis la termometro indikis precize la ĝustan temperaturon por bebo-bano. Sed ne imagu, ke sinjorino Blackshaw fidis al nura termometro...

Tamen, ĉi-foje ŝi ne metis la nudan brakon en la akvon. Ne! Roger, kiu kutimis neniam plori antaŭ sia bano, ploris, eksterdube ploris. Kaj li ploris pli kaj pli laŭte.

"Staru kie li ne povas vidi vin, plej kara. Li ne alkutimiĝis al vi ĉe la bano," diris sinjorino Blackshaw, ankoraŭ malvarme. "Ĉu, karuleto? Jen, jen!"

Sinjoro Blackshaw eklipsis sin kaj sentis sin absurda. Sed Roger daŭre ploris. Li plore purpurigis sin. Li ploris ĝis la vejnoj elstaris sur lia frunto kaj lia buŝo similis al mapo de Aŭstralio. Li plore igis sin monstro de malbeleco. Nek patrino nek vartistino povis iel ajn efiki ĉe li.

"Mi kredas, ke vi lin malkvietigis, plej kara," diris sinjorino Blackshaw eĉ pli malvarme. "Ĉu ne estos prudente foriri?"

"Nu..." protestis la patro.

"Mi kredas, ke vi devas foriri," diris sinjorino Blackshaw, sen ama vorto, kaj videble reganta sin nur malfacile.

Kaj sinjoro Blackshaw iris for. Li devis iri. Li iris en la senelektran nokton. Li direktis sin al la Elektrejo, ne ĉar la akcidento ĉe la Elektrejo tiumomente havis por li eĉ dupencan signifon, sed nur ĉar la Elektrejo estis la sola loko, al kiu li povis iri. Kaj eĉ ekstere, sur la malluma strato, li povis aŭdi la incitan elokventcon de sia ido.

Homoj interparolis dum ili palpis sur la strato, kaj aŭ ŝercis malfavore al la nova Elektra Fako, aŭ sincere malbenis ĝin kun la aŭtentika rekta

## FIANCIGO

*Al intima mia peto,  
Ripetita fojojn ses,  
Vi mallevis nur okulojn  
Kaj respondis kurte: jes!*

*Ekster hejmo lupe hurlis  
Arkta neĝo-wragan'.  
Nudon vian palpe serĉis  
je kares' avida man'.*

*Kia ĝoj'! Sur fingro via  
Oras mia glata ring'.  
Mi ne vidas neĝoflokojn —  
Ĉie blankas nur siring'!*

parolstilo de la Kvin Urboj. Kaj dum Sinjoro Blackshaw malsupreniris la deklivon al la urbo, lia koro estis same malluma kiel la strato pro kolero kaj seniluziigo. Li plorigis sian infanon!

Iu haltigis lin.

"Ej, sinjoro Blackshaw!" diris iu voĉo, kaj sub la voĉo mano eklumigis alumeton por ekbruligi pipon. "Kion si'nifas tiu ĉi eklipso per kiu vi reg'las nin?"

Sinjoro Blackshaw tute trarigardis la demandanton — laŭ sia kutimo kiam la cerbo tre laboris. Kaj subite li ridetis en la alumeta lumo.

"Tiu infano ne ploris ĉar mi ĉeestis," diris sinjoro Blackshaw, serioze sereniĝante. "Tute ne! Li ploris, ĉar li ne komprenis la kandelojn. Li ne alkutimiĝis al kandeloj, kaj ili timigis lin."

Kaj li komencis iri rapide al la Elektrejo.

Sammomente la elektra lumo reaperis en Bursley. La kurento fluis denove.

"Pli bone," diris sinjoro Blackshaw,, kun vespiro.

Tradukis: *Marjorie Boulton*

INTERNACIA  
LINGVO

Ni citas el Enciklopedio de la Sociaj Sciencoj vol. IX, New York, 1950, p. 168, eldiron de la fama usona lingvisto.

La logika neceso de internacia lingvo en modernaj tempoj estas en stranga kontrasto al la indiferenteco kaj eĉ kontraŭemo, kun kiu la plimulto de la homoj rigardas ĝian ebilon. La provoj ĝis nun faritaj por solvi la problemon, inter kiuj Esperanto verŝajne atingis la plej altan gradon de praktika sukceso, tuŝis nur tre malgrandan parton de la popoloj.

— — — La rezisto kontraŭ internacia lingvo havas malmulte da logiko aŭ psikologio por si. La supozita artefariteco de lingvo kiel Esp. aŭ iu el la similaj lingvoj, kiuj estis prezentitaj, estis absurde troigata, ĉar estas sobra vero ke estas praktike nenio en tiuj lingvoj kio ne estas prenita el la komuna stoko da vortoj kaj formoj kiuj grade evoluigis en Eŭropo.

La malestado de intereso je la problemo de internacia lingvo spite al la evidenta bezono je tia estas elstara ekzemplo por tio en kiel malgranda amplekso logika aŭ intelekta ekkonita neceso ludas rolon en la akirado de lingvo. Eĉ la akirado de la plej supraĵa kono de fremda nacia lingvo estas laŭ ĝenerala imago certgrade samvalora al la identiĝo kun la koncernaj popolo aŭ kulturo.

La pure instrumenta valoro de tia kono estas ofte tiom kiom nulo.

Ĉiu konscie konstruita internacia lingvo devas renkonti la grandan malfacilon ne esti sentata kiel io kio

## LA ETERNA SHERLOCK HOLMES aŭ PRI LA DETEKTIVROMANOJ

La instinkto de la serĉado estas unu el la plej praaĵ kaj primitivaj homaj sentoj. Krome ĝi estas eĉ unu el la plej fortaj infanaj inklinoj. Kiam malgrandaj infanoj ludas kaŝludon, ili oferas al tiu ĉi instinkto! Malgrandaj infanoj estas la unuaj detektivoj. Kaj la kaŝludo estas la unua detektivaĵo! Sed, inverse, ankaŭ ĉiu detektivaĵo estas kaŝludo. Ĉar ĉiu detektivaĵo demandas. Ĝi volas scii: kiu, kio, kiam, kie, kiel, kial?!

Tamen, en sia pli alta senco, ankaŭ ĉiu scienco estas detektivaĵo. Ĉar ankaŭ la scienco serĉas ion, kio estas nekonata kaj kaŝita. Kaj la religio estas detektivaĵo! Ĉar ĝi volas malkovri la misterplenan Farinton de ĉio ĉirkaŭ ni, la enigman Kreinton de la vivo, herbo kaj Universo!

Ni ĉiuj estas detektivoj! Ĉar ni ĉiuj estas esplorantoj kaj malkovrantoj. Bedaŭrinde, ĝis nun ankoraŭ neniu ekpensis, ke la matematikon oni povus konsideri detektivaĵo. Kaj verŝajne vi protestus, se mi asertus, ke ankaŭ la bakteriologio estas iaspeca detektivaĵo. Kaj la fiziko. Kaj la historio!

Ĉiu enigmo estas detektivaĵo. Kaj, male, ĉiu detektivaĵo estas enigmo!

---

reprezentas certan popolan kulturon.

Sole la estonteco montros ĉu la logikaj avantaĝoj kaj la teoria neceso de internacia lingvo povos venki la reziston vaste simblan kiun ĝi devas renkonti.

El "Interlingvistika Informa Servo", Jens-Due-Str. 25. Flensburg (Germ.). (Jarabono: 6 germ. markoj.)

En iuj epokoj la homoj ŝatis enigmojn. Tamen ne en ĉiuj epokoj oni nomis ilin detektivaĵo!

La detektivromanoj estas novaj. Sed la detektivaj metodoj ne estas novaj! Ili estas tre aĝaj, same aĝaj kiel la homaro mem! Ĉar ĉiam ekzistis strangaj kaj neklarigeblaj okazintaĵoj kaj faroj. Kaj ĉiam ekzistis homoj, kiuj volis klarigi kaj ekspliki tiujn okazintaĵojn kaj farojn.

Verŝajne la unua detektivo estis jam la paleolitika praprahomo. Bedaŭrinde, ni scias nenion pri liaj tiufakaj sukcesoj aŭ malsukcesoj! Sed la klasika literaturo provas liveri al ni plurajn ekzemplojn de bona detektiva laboro! La maniero, laŭ kiu Salomono juĝis du kverelantajn virinojn/I. Reĝ., III, 1—28/, estas bela peco de sprita detektiva solvo. Similajn praktikojn oni trovas en hindaj, arabaj kaj aliaj rakontoj. Unu el la plej malnovaj detektivaĵoj de la mondo estas la Odisea malkaŝo de Aĥilo inter la filinoj de Likomedo. Se Odiseo estus profesia detektivo, li rigardus tra serura truo, aŭ, simple, li demandus la lavistinojn. Sed estante viro sprita, li uzis la faman artifikon kun la glavo kaj juveloj. Ankaŭ reĝo Edipo estas detektivo, malgraŭ tio, ke Sofoklo tute ne intencis krei detektivaĵon per sia tragedio. Kaj Hamleton jam Waringhien nomis princo-detektivo kaj princo de la detektivoj!

Ni lasu la klasikajn literaturojn!

Al la detektivaĵoj oni iam riproĉas, ke ili estas malmoralaj. Oni asertas, ke en la legantoj ili vekas murdajn inklinojn kaj latentajn krimin-

stinktojn! Nu, same bone oni povus diri, ke ili vekas ardajn justecsentojn! En ĉiu bona detektivaĵo la krimo estas io akcesora, io tute flanka kaj malĉefa! Ĉar la detektivaĵo ne bezonas murdon, ŝtelon aŭ perfortan senvirgigon! Ĝi bezonas demandon, misteron kaj enigmon! La kadavro estas tie nur kiel komenco. Unue devas esti kadavro, por ke, entute, la rakonto povu ekmarŝi! Krome, la moralo de la detektivromanoj estas strange rektlinia. Sur la unua paĝo okazas krimo! Sed estu certa, ke sur la lasta paĝo sekvas justa kaj severa puno! Scotland Yard, la polico aŭ detektivamatoro kaptos la krimulon! Sed per tio la rakonto finiĝos! Ĉar per tio la mistero estas solvita! La intelekto respondis la demandon de la Sfinkso! Kaj ĝi havas nenion plu por respondi! Ĝi ne zorgas, ĉu la krimulo ricevos dek jarojn da karcero aŭ ĉu oni lin pendumos. Ĉar tio jam estas afero de la Justeco!

La moralo de la detektivromanoj esence ne diferencas de la fabela moralo! En la detektivromanoj la Bono venkas la Malbonon! Ankaŭ en la fabeloj la Bono venkas la Malbonon! Ĉar en la detektivromanoj, same kiel en la fabeloj, ĉiam, fine, oni devas venki la Drakon! Tion volas la normala justecseno! Leganto!

Kaj, eble, ĝuste tiu ĉi morala principo iom kunkulpas pri la neordinara ŝato, kiun la detektivromanoj ĝuas! Sed, male, same ĝi kulpas pri la relative malvarmaj simpatioj, kiuj trafas la romanojn spionajn, gangsterajn kaj ŝtelistajn!

Mi ne scias, kion Francoj opinias pri Arsène Lupin! La Anglosaksoj kaj Slavoj vidas en li nur tion, kio li estas: ŝtelisto. Same Al Capone ĉiam restor nur gangstero! Eble Arsène Lupin kaj Al Capone estas herooj! Sed ili estas malbonaj herooj! Kaj ili estas

malbona literaturo! Ĉar ili ne obeas la fabelan moralon! En la gangsterromanoj la Drakoj ne estas venkataj. Ili venkas tie. Kaj ili vagas senĝene kaj libere!

En la spionaj, gangsteraj kaj ŝtelistaj romanoj la Drakoj elkateniĝas. En la detektivaj romanoj oni kaptas ilin! Ĉar la Homo estas ĉasisto! Ĉar la Homo volas, ke la Sovagaĵaj Bestoj ne fuĝu kaj forkuru! Kaj ĉar la Homo scias, ke la Sovagaĵaj Bestoj povus malutili kaj domaĝi!

La heroo de la detektivaĵo kutime estas serĝento, inspektoro aŭ superintendantato de Scotland Yard. Iam anstataŭ inspektoro de Scotland Yard povas roli eĉ privata persono. Sed tiam kiel detektivo ne funkcios ekzemple tajloro, ĉefa librotenisto aŭ profesoro de la kompara lingvistiko, sed ĉiam nur juna lordo, ĵurnalisto (raportisto de Sun aŭ Herald) aŭ juna advokato! Ĉar ĉiuj aliaj profesioj estas iel nedetektivaj! Balaisto ne povas esti heroo de detektivaĵo. Sed eble li povus esti krimulo. Viandisto, bonokaze, povus iĝi kadavro! Sed li ne povus fariĝi inspektoro Ganimard! Skulptisto ne povus esti serĝento. Sed tre verŝajne li estos suspektinda elemento, kiel ĉiuj skulptistoj, pentristoj kaj aliaj artistoj. Tial eĉ Pastro Brown estas escepto inter la detektivoj! Kaj, ĉar li estas escepta, li apartenas al la alta literaturo!

Parolante pri la detektivo, mi ne povas preterlasi la motivon de lia fidela akompananto, kunulo. Sherlock Holmes havas sian Watson, Hercule Poirot posedas sian Hastings!

(*Daŭrigata.*)



## MALJUNULO

Unika, pripensiga pola satiristo kun tre ampleksa horizonto.

Ĉiusemajne — precize je la sepa vespere vizitas min iu vid-al-vide loĝanta maljunulo — strangulo kaj melankoliulo.

Mi proponas al li fotelon.

— Eble vi eksidos — mi diras. La fotelo estas antikvaĵa, tre plaĉa, sinjoro.

La maljunulo esploras.

— Mi dankas vin, transcende dankas. Kion do valoras sidado, sinjoro mia kara, kion valoras sidado! Rigidigas nur la genuoj, la pantalonon nur ŝiriĝas je ĉifonoj. Kaj ĉu vi scias, kiom kostas pantalonon?

Mi rigardas la maljunulan pantalonon kaj konstatas, ke ĝi egalvaloras du parolojn per telefonaŭtomato. Eĉ unu groŝon ne pli.

— Kaj ĉu vi scias kio plej turmentas min? Tio, ke mi nenion pri ĉio komprenas. La kosmo, vi deklaras — unu granda enigmo! Ŝajne ĉio moviĝas, turniĝas, sed kiacele, sinjoro amata, kiacele? Biologia sensecaĵo — jen ĉio. Sed — ni provu suriri la teron, la globon frenezan kaj tragikan; kion ni vidas? — nur malagrablaĵojn. Jen la ŝtatoj, oni diras. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, de Eŭropo, de tutmondo. Sed kion signifas ŝtato? Iom da polico, iom da religio kaj — muzeo.

— Kaj la standardo? — mi mencias malkuraĝe.

— Standardo . . . nur por ke estu pli gaje. Ĉar, vi rimarku, — la homo estas iel pli kuraĝa kiam li vidas flage kovritajn domojn. Rememoroj viviĝas, grandaj rememoroj: Reĝo la

Brava, la Kurbobuŝa, Bastonkrura, Nigra, Blanka, Verda . . .

— Verda ne ekzistis — mi ĝustigas timeme.

— Jes, vi pravas. Sed ne gravas. Hm, vi junuloj tion ne komprenas. Mi, sinjoro amata, kiam mi vidas kavalierian eskadronon kaj tiujn flage-tojn, kaj tiujn vostojn, la polajn vostojn, mi verkonfesas al vi — larmoj pizformaj torentas. La koro premiĝas, patrioteca ĝuo, ekstazo! Tiam mi deziras posedi sabron, grandan, veran sabron kaj haki, haki kaj haki! Dekstren kaj maldekstren. Propran onklinon, avinon mi tiam dishakus. Jes, sinjoro mia amata, jen kuraĝo, sarmata sango aŭ kio.

— Vi trankviliĝu, sinjoro — mi aldonas, rimarkinte, ke la stranga maljunulo ruĝiĝis pro febrofervoro.

— Estas facile al vi diri "trankviliĝu". Sed kiel mi povas trankviliĝi? Mi ne povas trankviliĝi. Mi ne volas. Mi ne kapablas. — "Trankviliĝu"! Hieraŭ oni eksigis min de mia posteno. Konsideru nur, kia ordo regas en Polujo: Mi estis direktoro en firmao, kiu vendas elektraĵojn korktirilojn; miraklo de la tekniko; cent boteloj posekundo! Kaj oni min aĉe eksigis. — Pro kio? Pro drinkemo. Kaj ili nomas tion drinkemo! Ne, sinjoro, ĝi estas melankolio, melankolio. Mi malgajas jam ĉe vekigo. Fiuloj! . . .

La maljunulo rigardas al la fenestro. Suno subiras. Estas tre komika ĉielo.

— Cetero, sinjoro mia kara, kiu scias, eble ĝi est' hepato . . . ĉu vi kredas je la animo?

— Ne — mi respondas senhezite kaj ridetas.

# LIBRO-KULTURO

## Tagore, la unua nomo

Rabindranath Tagore: Malsata ŝtono. (Rakontoj de la mondfama hinda aŭtoro). Tradukis el la bengala lingvo Lakshmiswar Sinha kaj ilustris: Sukhamoy Mitra. 128 paĝoj, grandformata, 9 tupaĝaj ilustraĵoj, broŝurita sv. kr. 12: —, bindita sv. kr. 16:—.

Al la granda plano de UNESKO aliĝis niaj kompetentuloj kaj jen la unua Esp-eldono en serio, kies tasko estas sisteme internaciigi gravajn kulturvalorojn por la tuta mondo. Tagore, kiu parte estis delikata kaj profundkora poeto kaj verkisto, parte socia reformanto kaj religia filozofa, profeto de la amo kaj kompreno, estas digna unua reprezentanto de la serio kaj Eldona Societo (Malmö) aldonis multe da zorgoj, ke la verko ankaŭ laŭ la eksterajo estu grava kaj plaĉa.

Post la enkonduko de I. Lapenna pri la celo de la serio sekvas biografio de la hinda poeto en la klara prezento de Lakshmiswar Sinha. La novelaro de Tagore konsistas el sep noveloj; ili ĉiuj egale respegulas la noblan belecon de la poeta animo, kiu konvinke emanis siajn purajn sentojn por efiki en mondo, kies mateno ankoraŭ ne alvenis. "Estas vespero", diris la poeto, "kaj mi aŭskultas, ĉu iu el la vilaĝo vokos min spite la malfruan nebulon." Tiel aŭguras sian rolon la maljuniĝinta poeto, kies haroj "komencas blankiĝi". Nun cent jarojn post lia naskiĝo venis la tempo, kiam oni "vokas" kaj volas vidi la poeton spite la senstelan nokton.

La noveloj apelacias al la sama sento de delikata kompreno, kiel ĉiuj verkoj de Tagoru. Unu el la plej belaj el ili estas "Kabuliwala", kiun la legantoj de N. Pr. jam havis okazon legi en 1960, kaj kies atmosfero — en kvankam ĝi estas komplete hinda — en-

serĉas la leganton en iun noblan mondon de le revalorigo de la sentoj; dank' al infanimo, kiu ne konas la konvenciajn taksadojn kaj al vaganta fruktovendisto, kiu trovas parencajn sentojn en la animo de eta infano. — — Kompreneble tradicio kaj piaj sentoj trateksas ĉiujn rakontojn, sed ili altiras, ne puŝas pro sia fremdeco. Oni fermas la libron kun konsento, kiam Tarapado, la juna heroo de la lasta novelo fuĝas antaŭ la festeno kaj soleno, kiun oni aranĝas por li:

"Sed tiun tagon Tarapado ne plu estis videbla. Antaŭ ol la konspiro de boneco, amikeco kaj amo povus plene ĉirkaŭi lin, la bramanojunulo forkuris el la vilaĝo, ŝtelante ĝian koron dum pluvsezona nokto, malluma pro nubo, al sia sendezira, senlima universpatrino".

Pro la bela traduko de la valora volumo ni estas dankaj al L. Sinha. La originalaj, hindaj ilustraĵoj reprezentas tute alian stilon ol niaj nuntempaj samspecaj artproduktoj.

*F. Szilágyi.*

### Politiko kaj paco

Todor Jivkov: TRIUMFO LA POLITIKO KAJ PACA KUNEKZISTADO, ONI METU FINON AL LA KOLONIA JUGO. Eldonejo de Fremdlingva literaturo, Sofio 1960.

La subtitolo de tiu-ĉi libro estas: "Paroladoj, raportoj, interparoloj kaj eldiroj konekse kun la XV-a Sesio de la Asembleo de UNO". La libro disvolvas i. a. la politikan direkton de Bulgario rilate al paco kaj internaciaj kunrilatoj; pledon por la akceptigo de la Ĉina Popola Respubliko ĉe UNO; senvaligon de la politiko de la imperiistoj; la demandon pri paco aŭ milito; ktp., ktp. — Lingvo bonega!

*Baldur Ragnarsson*

— Do — mi ankaŭ ne — diras la maljunulo.

— Eble vi ĉkinteresiĝu pri la plej nova pola poezio? — mi proponas kaj elŝrankigas la ĵus aperintan, ore ornamitan kaj anserhaŭte binditan volumon de Stefan Napierski.

La maljunulo protestas. Li timas, li "ne komprenas". Nur Sienkiewicz.

Ni sidas vualitaj en krepusko. Kaj

— kiel kutime, kiel ĉiusemajne, de malproksime, kvazaŭ de sub la fotelo, elrampas la perfida voĉo de la infereta maljunulo:

— Sed, mia karega, mia ora, Konstanty amata, eble ni — hm... iome... iru por trinki iom da brandeto...

El la pola: *Walery Wiecko*  
(Bydgoszcz).



*Rara portreto de Rabindranath Tagore.  
(Lai la permeso de Rabindra Sadan, Santiniketan.)*

# LA TRUDO DE LA SORTO

William Shakespeare: OTELO, LA MAŬRO DE VENECIO. — Elangligo, enkonduko kaj notoj de RETO ROSSETTI. — Antaŭparolo de ROY WALKER. — Kovrilo de JOHN HARTLEY. — Eld. Stafeto, 1960 — Prezo: 1: 80 us. dol.

Shakespeare kries la dramon "Otelo" ĉirkaŭ la komenco de la XVII-a jarcento. Ĉiu-kaze "Otelo", per kiu la dramverkisto definitive eksekvis la vojon de la baroka arto, estas unu el tiuj verkoj de la granda brita aŭtoro, kiuj estas tute proksimaj al ni. La senlima pasio kaj ĵaluzo estas ŝatata temo al la publiko kaj la temo donas okazon al popularaj, kvankam nefacilaj roloj al aktoroj; sekve bonaj aktoroj donas grandan helpon al la perfekta scenkono de Shakespeare kaj reciproke. Kompreneble la sama pasio ne aperas nur en Otelo, sed ankaŭ en pli fruaj dramoj de Shakespeare, ankaŭ la malico por la malico mem, kiel ĉe Jago, havas siajn antaŭulojn en aliaj dramoj.

Otelo estas lojala negro, kies lojalecon oni ĝis la komenco de la tragedio ĉiu rekonis kaj eĉ premiis. Tio, kio latentas en li, estas lia negreca komplekso, la diferenco de la koloro kaj la suspekto, ke io povas okazi. Lia tragedio estas, ke tiu ĉi suspekto serĉas al si nutraĵon en la subkonscia humo de la instinktoj, kaj kiam la demone eltrovema Jago ekfunkciigas siajn intrigojn, el Otelo eksplodas la prainstinktoj kaj ilia demona forto ekstermas ĉiujn kaj ĉion, kio komence de la dramo estis en akurata ordo. Neniu, ĉu kulpulo, aŭ senkulpulo povas savi sin kaj eĉ por Jago troviĝas io pli kruela ol li mem, t. e. la fato, kies rimenojn li tratanĉis.

Multaj problemoj nove kaj nove reaktualigas la ŝekspiran dramon kaj suzozeble ĝi estas inter tiuj 5—6 grandaj kreaĵoj, kiuj ĝuas de sia kreiĝo preskaŭ kontinue egalan popularecon.

Stafeto havas gravan meriton pro la eldono de tiu ĉi eterna dokumento kaj antaŭ ĉiu devas doni ĉiun laŭdon al la traduko. Nia Otelo havas monumentan signifon. La traduko estas eksterordinare altranga, zorgema, poezia kaj sinrega. Per la lasta atributo ni volas konstati, ke la glosaro en la fino de la libro estas surprize mallonga, entute 17 vortoj, (krom la interjekcioj), kaj neniu kredu do, ke legi la esperantan tradukon de "Otelo" estas pli komplika, pli vortoserĉa afero, ol legi ĝin en nacia lingvo. Sen alia intenco, tute

hazarde ni citas du partetojn el la tragedio, por doni gustprovon:

*Otelo:*

Cio en ordo, dolĉa — — iru dormi.  
— — Mi mem, sinjoro, viajn vundojn flegos  
Portu lin for. (*Oni forportas Montanon*)  
Kontrolu tra la urbo, Jago, bridu  
la homojn, kiujn la tumulto taŭzis.  
Venu plejkara. En soldata sorto.  
La dormon ofte ŝiras la perforto.

*Desdemona tiel parolas en la fina akto al la senbrida Otelo:*

Morti pro amo estas nenature.  
Ve, kial maĉas vi la suban lipon?  
la furio sanga vin skuegas:  
jen la aŭguroj, tamen mi esperas,  
ke tio min ne celas.

La dramo fluas en la majstra lingvo de Rossetti nature, sed tio tute ne signifikas, ke Rossetti komentas Shakespeare kaj simpligas lian konscian kaj tre pripensitan lingvaĵon. Rossetti enprofundiĝas en tiun abundan lingvon kaj forme kaj esence restas fidela al la originalo. Per tiu ĉi traduko kreskis la nombro de niaj vere grandaj tradukverkoj. Otelo apartenas al la plej grandaj faroj kaj oni demandas sin: "Kiam oni prezentos tiun ĉi potencon verkon en Esp. eble en teatro de iu kongresa urbo?"

*F. Szilágyi.*

## Dua debuto de Jean Forge!

Post 30-jara silento la pola filmisto kaj aŭtoro Jean Forge (Fethke) denove trafikis la Esperantan parnason: Ĉe Eldonejo KOKO ĉi-aŭtune aperas nova verko (la sesa KOKO-libro) kun titolo LA VERDA RAKETO. Kredible tiu ĉi originala novelaro satira same ĉarmos nin kiel la antaŭmilitaj, nun klasikaj verkoj: Abismoj, Saltego trans jarmiloj kaj Mr. Tot aĉetas mil okulojn.

Per la *verda raketo* (fikcia historio, kiu kondukas nin al la malproksima planedo Pax, kie postvivas la praesperantistoj) la legantoj ekskursas tra la tuta Esperantujo.

La Eldonejo KOKO (Randbölvej 4, Kopenhago F) atentigas pri speciale favora oferto kun 33% rabato al antaŭmendantoj, t. e. ĝis la 1/11 1961. Oni nur petu la eldonplanon kun mendilo.



# SONORIGU DISLAŬTEGE!

*La junaj astronomoj-esperantistoj: Tragedio en la Universo.* El la originala manuskripto esperantigis Ivo Rotkvič. 94 p. 14,4x 20,2 cm. Ekstra eldonaĵo de La Kroatia Naturscienca Asocio kaj La Kroatia Esperanto-Ligo (Amruševa 5, Zagreb, Jugoslavio). Prezo 0.75 dol. aŭ 10 steloj.

La verko, prezentota ne estas ĉiutaga. Ĝin distingas ia eksterordinara seriozeco, sed ankaŭ la fakto, ke ĝi estas kolektiva verko. Ĝiaj aŭtoroj estas grupo de junaj astronom-amatoroj, kiuj surprizis la estrojn de la Zagreba Observatorio kaj ankaŭ la publikon per siaj profunda interesiĝo kaj talentaj sciencaj esploroj kaj ne malpli per sia literatura kapablo, kiu lasta kune kun la ceteraj faktoroj rezultis tiun ĉi belan verkon. Ĝi ne estas tro ampleksa, la libro entute enhavas 94 paĝojn, sed tiu spaco estas plenigita per gravaj vortoj, kiuj ĉiuj estas sialoke kaj diras tion, kiom oni devas diri por atentigi la homojn pri grava danĝero. Antaŭ la minaco de la hidrogena bombo ni devas scii, ke ankoraŭ ni havas la sorton en nia mano, ankoraŭ — — lastmomente — — ni povus preventi la katastrofon.

La libro komenciĝas per "Ekrigardo en la eternon". Jen kritika skizo kaj klarigo pri la kunligo de astronomio kaj historio kaj indiko de faktoj, kiuj devas gvidi al katastrofo. Ĉio ĉi estas prezentita kiel akra kritiko de la nuna socia, aŭ intersocia vivo,

rigardata el la perspektivo de fora estonteco, kiam sciencisto de tute nova mondo rerigardas al la abomenaj cirkonstancoj, kiuj ekstermis la vivon en la XX-a jarcento, kiam la homa gento iĝis sinmortiginto. Same senindulge severe pentras la sekva ĉapitro "Tragedio en la Universo" la morton de la lastaj homoj, kiujn la hidrogena bombo trudis iĝi grotloĝantoj kaj eĉ tiel ili ne povis savi sin. Kio okazis sur la tero inter 1960—70, tion esploras en la libro prudentaj loĝantoj de aliaj planedoj, stampante la okazintaĵojn kiel la plej pezan krimegon en la Universo.

La lasta ĉapitro "Vivi ni volas" dramece apelacias al la konscienco de la mondo. Jen kelkaj karakterizaj vortoj (kiuj ilustras ankaŭ la kuraĝan, al la temo adaptiĝan stilon de la eminenta tradukisto): "Sonorigu dislaŭtege! Sonorigu alarme! Nunege tujtuge sonorigu, dum ankoraŭ estas la tempo..."

Postparolon kun plena aprezo de la grava misio de la junaj gravuloj verkis prof. Ivan Lupek.

Multaj kunlaboris, konformigis sian volon, sian angoron por doni gravan verkon en vian manon. Leganto, aldonu vian voĉon kaj volon, ke ankaŭ en via lando tiu ĉi neordinara pacapelo estu same pridiskutita "best seller", kiel en Jugoslavio, kie instruistoj kaj lerneja junularo diskutadas, relegas kaj transprenas la vivgravajn diraĵojn de la libro. Sinceran laŭdon al ĉiuj kunlaborintoj! *F. Szilágyi.*

## Hungara vivo

"Hungara Vivo" estas nova organo belpresita, eleganta revuo kun bonegaj kunlaborantoj. Celo de la nova, ilustrita organo estas: "La hungara esperantistaro uzante la vivantecon de la internacia lingvo Zamenhofa, deziras prezenti siaflanke... sciindaĵojn pri Hungarlando kaj popolo, pri ĝia kulturo... Ĝi volas doni realan bildon por objektiva observado." (Julio Baghy). La grandformata 32-paĝa unua n-ro enhavas artikolon pri la prezidanto de la Hungara Popolrespubliko, I. Dobi, tradukojn de K. Kalocsay (Petöfi, A. Komját), diversajn informcelajn artikolojn kun socia karaktero, artikolon de la poŝta ministro, kiu mem estas malnova esp-isto (St. Kossa), originalajn poemojn de Baghy kaj Tárkony, noveltradukon de Bodo, kelkajn kulturinformajn artikolojn, sciigojn pri sporto, filatelio, arto.

Mem tiu ĉi registrado de kontribuajoj es-

tas rekomendinda en si kaj la lingva nivelo estas ja unuaranga. La abono kostas 24: — forintojn por unu jaro. 4 n-roj aperas jare.

Al nia nova kolego ni deziras sukceson kaj ĉiun ŝancon laŭ la vojo, fiksita en la enkonduka artikolo de J. Baghy.

## "Jugoslavia fervojisto"

Monata fervojista Esperanto-revuo, estas organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE).

Tiu ĉi bela revuo aperas tre riĉe ilustrita sur 24 pagoj + kovrilpaĝoj.

Krom la fakaj kaj primovadaj rubrikoj, ĝi enhavas ankaŭ jenajn rubrikojn: "El fremdaj fervojoj", "Ekkonu nian landon", "Ekkonu la mondon", "Nia rakonto", "Fakaj terminoj", "Humoro", k. t. p.

Jarabono por eksterlando estas 1 dolaro, aŭ egalvaloro. Abonebla ĉe Esp-skolan (Barnhusg, 8, Stockholm).

## La Suda Stelo — Prometeo

Tiu ĉi elstare grava revuo post la fuizio kun la japana revuo transformiĝis je kvaronjara periodaĵo, kies enhavo dank' al la orientaj kaj sudaj redaktoroj donas freŝan, gravan, reprezentan kaj interesan legaĵon al ĉiuj amantoj de la literaturo. La aktuala numero (Printempo, 1961 32-paĝa, grandformata, ilustrita) enhavas valorajn artikolojn pri rasismo kaj politiko, alian pri la japana arto, literaturan parton kun kontribuoj de Baghy, Vancik, Thorsen k. c., riĉan kultur- kaj librokronikon kaj fine daŭrigon de la konstanta, tre zorge redaktita bibliografia rubriko, kiu indikas la diversajn ĉefajn artikolojn kaj literaturajn verkojn en la esp. gazetaro. La jara abonprezo de la ambicia kaj riĉenhava revuo estas 11/2 us. dolaroj aŭ egalvaloro. Mendebila ĉe Esperantoskolan, (Stockholm, Barnhusg. 8).

## Vjetnama literaturo

Quang Loi: SUDE DE LA 17a PARALELO. Tradukis Nguyen Minh Kinh. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1960.

PRO UNU BOVINO. Elektitaj Rakontoj pri la Militrezistado en Vjetnamio. Tradukis gesperantistoj de la E. klubo en Hanojo. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1960.

Estas ĝojige, kiom disfloras Esp. lastatempe en la simpatia Vjetnama Demokrata Respubliko. Krom la jam forta kaj ĉiam disvastiĝanta Esp. Movado en tiu lando, literatura agado per Esp. jam estas tie tre vigla. Nun laste atingis min la supre-menciitaj libroj, kiuj ambaŭ estas tre rimarkindaj kaj pensinstigaj. La unua estas verkita de ĵurnalisto fama kaj prezentas dokumentojn, severajn akuzojn pri "la dumkvinjara subpremadado, punzudita al la sudvjetnama popolo". Nepege atentinda legaĵo por ĉiu serioze pensanto.

La dua libro enhavas 19 rakontojn de sammultaj vjetnamaj soldataj verkistoj, originale publikigitaj en la kadro de konkurso organizita de la Vjetnama Popolarmeo: "La plej karakteriza memoraĵo pri mia soldata vivo". Oni do povas atendi unike aktualajn aktivecojn de la temoj, vive rakontan disvolvado, se ne rafinitan artisman. Tamen, eĉ tio-ĉi lasta multloke konstateblas! Simpatia rakontaro, kiu laŭ mi konsiderinde superas tiun de la ĵusa *Ĉina Antologio*, esence parence-taman. Interesaj biografiaj notoj kompletigas la libron. — La stilo kaj lingvo de ambaŭ libroj estas kontentigaj.

*Baldur Ragnarsson*

## Aŭtoro de la jaro kaj Arĝenta

### Spronon

JOHN FRANCIS, kiu naskiĝis en 1924, debutis sur nia literatura kampo en 1952, kiam li estis unu el la kvar poetoj kies komunan poemaron eldonis STAFETO sub la titolo "KVAROPO". En tiu volumo aperis de Francis unu sola poemo, sed longa, eposeca, kiu sub la titolo "LA KOSMO" prenis kiel sian temon la tutan universon ekde ĝia kreiĝo post ankoraŭ milionaj da jaroj. Kompreneble en tiu kolosa temo la homo ludas nur etan kaj malgravan rolon. Eble estus utile, memori vin per kelkaj versoj:

La tera interludo milfoje kaj milloke  
roligās ĉiam same laŭ la esencaj celoj —  
triumfo kaj formorto; sed ĉiam, negofloke,  
en drivaj nebulojz masiĝas novaj steloj.

La nebulojz drivas unu de la alia  
al limo de la kosmo disiĝe kaj konstante.  
Pro vasto de l'procezo, sen movo iluzia  
ankoraŭ reehas ĉie, eternon mensogante.

Sed jam la astroj raras: kie antaŭe mikse  
kunsvarmis la mortantaj kun la embriaj  
steloj,  
jen nur mortantaj restas: nenie plu fenikse  
eksflamas posteuloj de l'forbrulintaj ŝeloj.

La astroj daŭre dronas en la mallum' avida  
ĝis cindre dispeciĝas la lasta stelaĉmento:  
kaj, ĉie konsumita de paraliz' insida,  
senlive sin etendas vakua firmamento.

En la postaj jaroj, liaj poemoj kaj noveloj aperis en la plej gravaj revuoj. Tiam, en la pasinta jaro 1960, aperis libroforme, denove en eldono de STAFETO, kolekto de liaj noveloj sub la titolo "VITRALO". En tiu ĉi kolekto aperas la milda satiremo kaj samtempe la profunda humanismo de la juna aŭtoro. La volumo, verkita en potenca kaj esprimiva lingvaĵo, montriĝis la plej grava kontribuo dum 1960 al la originala beletro de Esperanto, kaj tuj prenis lokon sur la plej alta nivelo de nia literaturo. Pro tio, la eldonoj KOKO, en konsulto kun la Prezidanto de la Internacia Verkista Asocio, nomas s-ron John Francis "Aŭtoro de la jaro", kaj prezentas al li la Arĝentan Spronon de KOKO, kaj specialan Diplomon.

*(Ensendis: Eldonejo Koko).*

En "Metallarbetaren" (Metallaboristo), t. e. fakgazeto sveda in legas pri la vizito de germanaj junaj metallaboristoj, kiujn la koncerna fakorganizo invitis por rondvojaĝo kaj kurso en Svedlando. La 32 okcidentgermanaj junaj laboristoj rimarkis gravajn sociajn rezultojn, i. a. la grandiozan fakorganizan lernejon en Runö, en kies belaj salonoj kaj parko ili pasigis kontentoplenajn tagojn. Iliajn opinionon resumis unu el la partoprenintoj per la jenaj vortoj, kiuj enhavas ankaŭ iom da objektiva kritiko:

"Tiel ni vidis kaj lernis ĉiutage ion novan. Multo estis al ni fremda, ĉar en Germanujo estas alie. Ni demandis nin konstante, "Ĉu estas pli bone aŭ malpli bone ordigite ĉi tie? Preskaŭ ĉiam ni devis konstati, ke estas pli favore en Svedlando. Sed troviĝas tamen por ni nekompreneblaj cirkonstancoj, kiel ekz.: Kial la svedoj devas mem pagi la kostojn al la dentkuracisto? Tio estis malfacila por plenkompreni, kvankam oni klarigis al ni — — ke eĉ socialdemokratie direktita ŝtato malfacile povas ĉion aliformigi samfoje kaj ke Svedujo tamen dum tre mallonga tempo transformiĝis el relative malriĉa ŝtato al unu el la plej modernaj industriŝtatoj en la mondo. Ke tiu ĉi transformiĝo povis aranĝiĝi tiel rapide kaj tiel bone el la vidpunkto de la laboranta popolo, sendube dependas altgrade de la kontribuoj, fakaj, politikaj fare de la laborista movado. Tio estis nia plej esenca impresio el Svedlando.

(*El Metallarbetaren, 31-32/1961.*)

### Petro Stojan mortis

Petro Stojan estis vortaristo eminenta, aŭtoro de pli ol dekduo de vortaroj, aŭtoro de nia granda Bibliografio, artikoloj kaj libroj. Li naskiĝis en 1884, vivis 77 jarojn. Li estis grava izolulo en nia movado, kies verkoj, precipe la enciklopediaj restos tre gravaj. Dum la lastaj jaroj lia izolemo kelkfoje transiris al ia senkomprena subjektiveco. Pri tio atestas lia laste aperinta libro "Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto" kun geniaj partoj kaj multaj ekstremaj troigoj.

Esperantista Klubo ĉe Mezlernejo (Lad. Buzck) Frydeck Místek (Ĉeĥosl.) aranĝas ekspozicion de infanaj desegnaĵoj de infanoj el tuta mondo. Ĉi tiu ekspozicio povus esti tre valora por nia movado. Sendu materialon al ni! Dankon!

Mi deziras korespondi k. ĉ. l., p. ĉ. t., PI, PM. Henry Erlandson, Bengtstorp, Vikersvik, Svedlando.

### Harrogate

estis valora travivaĵo al la partoprenintoj. Pro manko de loko ni ne povas detale raportiri eĉ pri ĝia kultura programo: ni nur mencias, ke ĝia arta festivalo kun diversaj aranĝoj, ekspozicioj, konkursoj certe estos ĝermo de tute nova, internacia evoluo, ke en ĝia teatra sekcio oni ludis la malnovan farson "Pathelin" kaj cetere dramojn de Ĉeĥov, Cocteau kaj Sartre, oni prezentis dancojn kaj muzikon, t. e. ankaŭ la koncerta parto donis multe da plezuro, same la filmoj kaj bonege sukcesis ankaŭ la infankongreso kaj la "uverturo" t. e. la Seminario "Oriento-Okcidento" en Londono. Ni menciuj tamen aparte la "muzik-dramon" (kombinon de koncerto kaj scenoj pri la vivo de Liszt (R. Dupuis).

### Gento — ponto inter pasinto kaj estonto

jen per tiuj ĉi vortoj komenciĝas la kongresa raporto de Sennaciulo pri la SAT-kongreso en la belga urbo. La kongreso, kiun partoprenis el 17 landoj 374 kongresanoj, trovis inspiron en la belga urbo, kies plezuroj kaj programo estis "senpaŭza" laŭ la sama raporto. La urba publiko kaj la magistrato bonvole akceptis la kongreson, kies kulturprogramo, i. a. kun dramoj de Cocteau kaj Sartre, efikis internen kaj eksteren kun la forto de la konscie bona organizo. La laborakunsidoj, kiel ĉiam, estis bone vizititaj kaj viglaj.

### Enigma-konkurso

La premiito pro la solvo de nia tasko en nro 1/1961. Estas s-ino A. Hohlova, Kiev 24. Bogomolca 5. Kv. 20. USSR. Multaj solvojn alvenis.

Male la tasko de la dua n-ro ne kaptis la interesojn. Nun ni prezentas du nomojn: Paul Firsfrog kaj Ivan Dratec. En la nomoj de tiuj du sinjoroj estas kaŝitaj familiaj nomoj de kvar originalaj verkistoj. Solvojn ni petas antaŭ la 15/1, 1962. Bv. noti sur la koverto: Enigmokonkurso.

Josef Juranyi, Beloianisz-u 11. Eger, deziras korespondi pri agronomaj kaj ekonomiaj aferoj. Vi povas ankaŭ mem elekti temon, mi certe respondas.